

LINGVAJ ANGULOJ

Félicien BARONNET

SAT-Broĵservo / Laite!

F 47470 Beauville

1990

F. BARONNET

LINGVAJ ANGULOJ

Broŝurservo de S.A.T.

ĉe

Cercle espérantiste de l'Agenais

"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut

1981 * 7 FF

 * E N H A V O *

| | |
|------------------------|-------|
| Gramatika superrigardo | ... 5 |
| La Esperanta elparolo | ...12 |

L A V O R T O

| | |
|--|-------|
| La gramatika karaktero de la radiko | ...14 |
| Pri vort-kunmeto | ...15 |
| Afiksoj (UL, IO, IĜ, OBLE/FOJE) | ...18 |
| La artikolo | ...21 |
| Korelativoj (KIO/KIU, KIA/KIEL, KIES, TIEL/TIOM IU/CERTA) | ...23 |
| La adjektivo (Predikato, adjektivo aŭ adverbo?) | ...27 |
| Adverboj - Konjunkcioj (ĉi, daŭre, ĉu/jen/aŭ, pli frue/antaŭe) | ...29 |
| La verbo (transitiva/netransitiva, insidaj verboj, tempoj, infinitivo post prepozicioj, adverbaj participoj, de/fare de) | ...31 |
| Prepozicioj (antaŭ, de/da, po, de post/ekde) | ...44 |

L A F R A Z O

| | |
|--|-------|
| Ĉu eblas korekte uzi "sia" ? | ...49 |
| La akuzativo (ĉe unu, adjektivo, for ..n!, post ĉirkaŭ kaj po, post ol, post signifi, post ĝis).. | 54 |
| La al-mova akuzativo (post sidiĝi, post kelkaj ad- verbaj formoj, post preter) | ...59 |
| La absoluta participo | ...64 |
| Lokigo de adverboj | ...66 |

| | |
|---------------|-------|
| L A S T I L O | ...67 |
| Idiotismoj | ...69 |

| | |
|---|-------|
| N O V A J L I N G V A J T E N D E N C O J | ...72 |
| (Neologismoj, alio/aliel/aliam..., pri la kondens- ado de la malsimplaj verboformoj) | |

| | |
|--|-------|
| K O N K L U D E : Kiel perfektigi sin... | ...78 |
|--|-------|

 Mallongigoj: S.A. : SAT-Amikaro ; E.L. : Esperanto-

Lernejo ; P.G. : Plena Gramatiko ;
P.V. : Plena Vortaro ; P.I.V. : Plena
 Ilustrita Vortaro ; D. : demando ;
R. : respondo

centre
minuscule
large gras
small grand

GRAMATIKA SUPERRIGARDO

Ni ne intencas ĉi tie prezenti gramatikan kurson por la ellernado de esperanto; ni nur celas respondi al la plej ofte renkontitaj demandoj, kies respondoj konsistigas la ĝeneralan strukturon de nia lingvo. Ni esperas utili al la kamaradoj, kiuj deziras bazi siajn praktikajn konojn de la lingvo sur gramatika fundamento, prepari porinstruajn ekzamenojn aŭ simple respondi al prilingvaj demandoj.

Oni kutime dividas la studon de gramatiko en tri ĉefajn partojn : 1° La vortfarado, kiu pritraktas la konstruadon de la vortoj; 2° la morfologio, kiu studas la parolelementojn vidpunte de la formo; 3° la sintakso, kiu studas la vortojn en iliaj interrilatoj en la propozicio kaj la propoziciojn en iliaj interrilatoj en la frazo.

Ni ĉi tie ellasos la fonetikon, kiu ne prezentas apartan malfacilon kaj dependas pli de la parola praktikado de la lingvo ol de teoriaj konsideroj.

centre
gras bold

I. VORTFARADO

- 1° Kia lingvo estas esperanto laŭstrukturo ?
- Ĝi estas aglutina lingvo, t.e. lingvo, kies elementoj estas neŝanĝeblaj kaj kiu formas siajn vortojn per simpla kunmetado de tiuj elementoj.
Kudristino = kudr'ist'in'o.
- 2° El kio konsistas la vortoj ?
- Vorto konsistas el : a) radiko(j); b) prefikso(j); c) sufikso(j); ĉ) gramatika finaĵo.
- 3° Kio estas radiko ?
- Silabo aŭ silabaro, kiu signas koncepton : personon, beson, objekton, kvaliton, agon, ktp.
- 4° Kio estas prefikso ?
- Silabo, kiu antaŭas radikon kaj nuancas ĝian sencon.
- 5° Kio estas sufikso ?

- Silabo, kiu gluiĝas post radiko kaj nuancas ĝian sencon.

6° Kiu estas la afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj) ?

- Prefiksoj : bo, eks, ge, mal, pra.

Sufiksoj : et, eg, aĉ, um, ĉj, nj, obl, op, on.

7° Kion oni celas per la termino "afiksoidoj" ?

- Afiksoidoj (prefiksoidoj kaj sufiksoidoj) estas afiksoj nur laŭforme. Ili ne nuancas la sencon de la radiko sed mem rolas kiel koncizigitaj radikoj. Ili obeas la regulojn de la vortfarado kiel veraj radikoj.

8° Kiu estas la esperantaj afiksoidoj ?

- Substantivaj: il (instrumento), an (loĝanto, membro), ul (persono), ec (kvalito), aĵ (konkretaĵo), ist (profesio), ar (grupo), er (parto), ad (ago), ismo (doktrino), uj, in.

Adjektivaj : em, ind, eble, end.

Verbaj : ig, iĝ, dis, re, for, ek.

9° Kiu estas la gramatikaj finaĵoj ?

- Ili estas literoj aŭ literaro, kiuj signas la gramatikan (kelkfoje la sintaksan) rolon de la vortoj : o por substantivo, a por adjektivo, e por derivita adverbo, j por pluralo ĉe substantivoj kaj adjektivoj, n por akuzativo, i por infinitivo, as, is, os, u, us por signi la tempojn kaj modojn de la verboj, ant, int, ont, at, it, ot, por la participoj.

10° Kiamaniere oni faras novajn vortojn ?

- a) per kunmetado de radikoj, afiksoidoj kaj gramatikaj finaĵoj : kudr'il'o.

b) per derivado el radikoj per afiksoj : dom'et'o.

11° Ĉu la radikoj havas propran gramatikan karakteron ?

- Radikoj kaj afiksoidoj havas propran karakteron gramatikan :

a) substantivaj estas : vir', hund', tabl', anim'.

b) adjektivaj estas : bon', jun', san', kuraĝ'.

c) verbaj estas : kur', am', kant', dorm'.

Koncerne la afiksoidojn, vidu demandon 8.

12° Ĉu gravas koni la gramatikan karakteron de radiko en la vortfarado ?

- La radiko "martel" estas substantiva, do signas la objekton mem, dum la radiko "komb" estas verba kaj signas la agon. Por nomi la objekton per kiu oni kombas, oni devas uzi la sufiksoidon "il" : kombilo.

13° Kiajn vortojn oni nomas samelementaj ?

- Vortojn, kies radikkaraktero ne diferencas de la gramatika karaktero de la finaĵo : viro, kuri, bona.

14° Kiajn vortojn oni nomas malsamelementaj ?

- Vortojn, kies radikkaraktero diferencas de la gramatika karaktero de la finaĵo :
ludo = lud(verba) + o(substantiva).
avari = avar(adjektiva) + i(verba).

15° Ĉu tiu distingo estas grava en la vortfarado ?

- En la samelementaj vortoj la gramatika finaĵo estas pleonasma kaj ne estas konsiderenda en la analizo de la vorto. En la malsamelementaj vortoj la gramatika finaĵo akiras propran sencion kaj estas konsiderenda kiel ĉefelemento de la kunmetaĵo.

16° Kio estas ĉefelemento de kunmetaĵo ?

- Ĝi estas la elemento, kiu donas al la vorto ĝian ĉefan sencion; ĝi ĉiam staras dekstre de la kunmetaĵo :
vaporŝipo, dormoĉambro.

17° Kiel oni nomas la maldekstrajn elementojn ?

- Ili konsistigas la flankelementon; ili pliprecizigas la sencion de la ĉefelemento : vaporŝipo, dormoĉambro.

18° Kiun sencion havas la gramatika finaĵo o en la malsamelementaj vortoj ?

- Post verba radiko, o signifas la nomon de la ago aŭ la nomon de la konkreta manifestiĝo de la ago :
a) La konstruo de tiu domo daŭris tri jarojn.
b) En tiu urbo oni renkontas belajn konstruojn.
Post adjektiva radiko, o signas ke la koncerna kvalito estas konsiderata kiel abstrakto : longo, bono, belo.

19° Kiun sencion havas la finaĵo i en la malsamelementaj kunmetaĵoj ?

- Post substantiva radiko, i signifas agi per, provizi je, stati kiel, ktp, laŭ la senco de la radiko. Marteli = agi per martelo; trui = fari truojn en; gudri = provizi je gudro.

Post adjektiva radiko, i signifas esti aŭ impresi kiel.

Verdi = esti verda; nigri = impresi nigre; riĉi = esti riĉa aŭ aspekti riĉe.

20° Kiun sencon havas la finaĵo a en malsamelementaj vortoj ?

- Post substantiva radiko, a signas jen kvaliton karakterizan, jen rilaton : Homa sento (homeca sento);

homa mano (mano de la homo).

Post verba radiko, a signas rilaton aŭ kvaliton.

Ĉagrena koro (ĉagrenita koro); amletero (letero pri amo).

21° Kiujn leĝojn oni obeu en la analizo de vortkunmeto ?

- Substantiva kaj adjektiva ĉefelementoj substantivigas la flankelementon, kiam tiu ĉi ne estas mem substantivo.

Dormoĉambro = ĉambro de dormo. Parolavara = avara je parolo.

Verba ĉefelemento adverbigas la flankelementon aŭ ĝin transformas en objektan predikativon.

Satmanĝi = sate manĝi. Pafmurdi = pafe murdi. Purigi = igi pura.

22° Ĉu afiksoj ne povas esti uzataj kiel veraj radikoj ?

- Afiksoj kaj afiksoidoj havas tion komunan, ke ili povas esti uzataj kiel veraj radikoj, do alpreni la diversajn gramatikajn finaĵojn : etulo, ereto, ilaro, arigi.

23° Kion vi scias pri la prefiksigo de radikoj ?

- Kelkaj radikoj povas esti uzataj kiel veraj afiksoj. Tiam ili nuancas la sencon de la radiko kaj ne estas analizeblaj laŭ la reguloj de la vortkunmetado. Vidu demandon 10°b. Tiu derivado devas esti konsiderata kiel escepto en esperanto.

Dikfingro ne estas fingro de diko, sed speciala fingro.

Junedzo ne estas edzo de juno, sed noveldeziĝinta edzo.

Oni precipe ne analizu per adjektivigo de la prefiksita radiko.

24° Kion oni nomas principo de neceso kaj sufiĉo ?

- a) Principo de neceso. En konstruo de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn

necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

- b) Principo de sufiĉo. Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj ne konfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa. Anstataŭ babilemeco oni diru babilemo; anstataŭ babilemulo, babilulo.

25° Kiam oni konservu la gramatikan finaĵon en flankelemento ?

- a) Se la ellaso de la finaĵo estigas malfacile elparol-eblan konsonantgrupon : astr(o)studo; ŝrank(o)breto.
- b) Se la ellaso renkontigas du samajn konsonantojn, aŭ voĉan kaj senvoĉan konsonanton : lit(o)tuko, laĉ(o)ŝuo, fig(o)kesto.
- c) Kiam tiu ellaso povas estigi konfuzon kun alisencavorto : post(e)ulo, in(o)formo, unu(a)eco.

26° Kion oni nomas "kuntenaj flankelementoj" ?

- Kiam la flankelemento konsistas el du elementoj, tiuj elementoj estas kuntenaj, se ili estas izoleblaj disde la ĉefelemento en formo de kunmetaĵo : vaporŝipasocio = asocio de vaporŝipoj.

27° Kion oni nomas "disfalaj flankelementoj" ?

- Disfalaj flankelementoj ne povas mem konsistigi regulan kunmetaĵon. Disigitaj de la ĉefelemento, ili disfalas en siajn proprajn elementojn : samideano = ano de la sama ideo; longkrurulo = ulo karakterizita de longaj kruroj. Ilin konsistigas adjektivo + substantivo, numeralo + substantivo, prepozicio + substantivo.

28° Kiel analizi la kunmeton "tutkora" ?

- Nepleonasma finaĵo sufiĉas kiel ĉefelemento por kunteni disfalajn flankelementojn. Tutkora = (tuta koro)-a.

29° Ĉu la vortoj "centjaro", "interakto" estas regule formitaj ?

- En tiuj vortoj, la finaĵo "o" ne estas pleonasma sed havas propran signifon de tempodaŭro. La pleonasmaj finaĵoj "oj" estas latente entenataj en la disfalaj flankelemen-

toj pro la pliuraliga efiko de la numeralo kaj de la prepozicio "inter". Centjaro = (cent jaroj)-o
 interakto = (inter aktoj)-o.

II. MORFOLOGIO

30° Kiel oni povas klasi la vortojn ?

- Konsiderataj en si mem oni povas klasi la vortojn en jenajn kategoriojn :
 - a) la substantivo; ĝi esprimas ideon pri konkretaĵo aŭ abstraktaĵo : homo, hundo, Parizo, belo, martelo.
 - b) la pronomo; ĝi anstataŭas substantivon difinitan aŭ malprecize prezentitan : mi, iu, ĉio, oni.
 - c) la adjektivo; ĝi akompanas substantivon, kiun ĝi determinas aŭ esprimas kvaliton al ĝi apartenantan : kampa domo, bela urbo.
 - ĉ) la numeralo; ĝi esprimas nombron aŭ nombran rilaton : kvar, kvina, duobla.
 - d) la verbo; ĝi esprimas ideon pri ago aŭ stato : kuri, sidi, mieni.
 - e) la adverbo; ĝi esprimas kvaliton aŭ cirkonstancon de ago aŭ stato, aŭ karakterizas alian kvaliton : rapide, somere, tre, multe.
 - f) la prepozicio; ĝi dependigas substantivon de alia substantivo, aŭ de verbo, adjektivo, adverbo : en, sur, trans.
 - g) la konjunkcio; ĝi kunigas du aŭ plurajn samspecajn kaj samfunkciajn parol- aŭ frazelementojn.
 - ĝ) la subjunkcio; ĝi dependigas propozicion de alia propozicio aŭ frazelemento : ke, antaŭ ol, post kiam.
 - h) la interjekcio; ĝi koncize esprimas tutan ideon pri sento, alvoko, sendepende de la ĉirkaŭaj vortoj : ho! he! ve!

31° Ĉu ne ekzistas vortoj, kiuj prezentas karakterojn de du el tiuj kategorioj ?

- La participoj prezentas verban karakteron kaj samtempe adjektivan aŭ substantivan aŭ adverban : difektita, helpanto, skribante. En kazoj, infinitivo prezentas verban kaj substantivan karakteron : aŭskulti estas malfacile = la aŭskultado estas malfacila. Inverse la ad-substantivoj prezentas samtempe substantivan kaj verban karakteron.

32° Ĉu estas vortoj, kiuj estas uzataj jen kiel certa parolelemento, jen kiel alia parolelemento ?

- Dum kaj ĝis estas prepozicioj, sed ili ankaŭ estas uzataj kiel subjunkcioj.

Mi laboris dum la tuta nokto (prep.); ĝis la mateno (prep).
Mi laboris dum mia amiko promenis (subj.); ĝis mia amiko revenis (subj.).

La tabel-adverboj: kiam, kie, kiel, kiom (ne kial) povas esti uzataj ankaŭ kiel subjunkcioj:

Kiam vi vizitos min ? (adv.) Mi vizitos vin, kiam mi disponos sufiĉan tempon (subj.).

III. SINTAKSO

33° Kion oni nomas frazelemento ?

- Frazelemento estas vorto konsiderata en siaj rilatoj kun la aliaj frazelementoj en la propozicio aŭ en la frazo.

34° Kiu estas la diversaj frazelementoj ?

- a) la subjekto; ĝi esprimas aferon pri kiu oni eldiras opinion aŭ ion asertas.
- b) la predikato; ĝi esprimas agon aŭ staton plenumatan de la subjekto.
- c) la objekto; ĝi esprimas la aferon trafitan de la ago plenumata de la subjekto.
- ĉ) la adjekto; ĝi esprimas ĉiun el la cirkonstancoj en kiuj plenumiĝas la ago.
- d) la epiteto; ĝi senpere karakterizas substantivon esprimante al ĝi apartenantan kvaliton.
- e) la suplemento; ĝi determinas substantivon, adjektivon, adverbon pere de prepozicio, kiu precizigas la naturon de la rilato inter la suplemento kaj ties determinato.
- f) la predikativo; ĝi troviĝas en la propozicioj en kiuj oni asertas, ke tiu aŭ alia kvalito apartenas al la subjekto pere de la verbo "esti" aŭ similsenca verbo :
la urbo estas bela; tion kredi estas malsaĝe.

35° Al kiuj vortspecoj apartenas tiuj diversaj frazelementoj ?

- La frazelementoj apartenas al tre diversaj parolelementoj. Subjekto povas esti :

- a) substantivo: La popolo estis subpremata.
- b) pronomo : Mi ne esperas sukcesi.
- c) infinitivo : Tion kredi estas malsaĝe.

ĉ) tuta propozicio : Estas domaĝe, ke vi ne alvenis pli frue.

Do ne ekzistas strikta rilato inter la parolelementoj, kiujn oni studas en la morfologio kaj ilia sintaksa rolo en la frazo.

(S.A., dec.51, jan.52, feb.52)

LA ESPERANTA EL PAROLO

En unu el siaj "Lingvaj Respondoj" Zamenhof diris, ke la vera stilo Esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas - aŭ almenaŭ devas esti - nur stilo simpla kaj logika. Transvalidigante tiun saĝan, kvankam iel negativan, konsilon sur la terenon de la elparolo, oni povus uzi la samajn terminojn. Jam de longe esperanto akiris sian propran spiriton, kiu konsistas ne nur el gramatikaj kaj stilaj karakteriziloj, sed ankaŭ el ia elparolo, kiun malrespekti ofendas la lingvosenton de bona esperantisto en tia sama mezuro en kia ĝin ofendas gramatika eraro aŭ stila fuŝaĵo.

Tial oni sin demandas, kial Zamenhof, jam en la unuaj paŝoj de esperanto, ne pli strikte fiksas la regulojn de la modela elparolado. La sama motivo, kiu malinstigis lin verki ampleksan gramatikon aŭ kompili dikegan vortaron, ankaŭ detenis lin dekreti tro striktajn leĝojn pri la elparolo. La riĉo de la eŭropaj lingvoj je vokalsonoj estas tre granda kaj referenci al tiuj sonoj por fiksi tiujn de la esperantaj vokaloj povus interesi nur klerulojn aŭ poliglotojn, sed neniel atingi neinstruitajn personojn aŭ unulingvulojn, kiuj, pli ol la unuaj, bezonas esperanton.

Inter la vokalsonoj li elektis nur tiujn, kiuj prezentas inter si sufiĉan diferencon, por ke la malplej edukita orelo povu ilin facile distingi. En sia verketo "Sonoj kaj vortoj de Esperanto" Paul Nylén prezentas la vokalojn de esperanto sur cirklo en la sekvanta ordo : a, e, i, u, o, inter kiuj lokiĝas la diversaj nacilingvaj vokaloj kun siaj diversaj nuancoj kun referencoj al la lingvoj angla, finna, hungara, germana, franca kaj precipe sveda.

Evidentas ke la plej bonan komprenon ni atingos per prononco de ĉiu aparta vokalo kun koloro kiom eble plej malproksima de

ĝiaj du najbaroj. Ekzemple a troviĝas inter e kaj o ; ĝi do devas tiom diferenci de o (en la angla vorto all) kiom de e (en la angla vorto hat). Oni devas ekzemple eviti konfuzon inter la vortoj karbo kaj korba. Tial Zamenhof simple konsilis, ke oni prononcu ĉiun vokalon nek tro malfermite (vaste) nek tro fermita (malvaste). Tro malfermita o prezentas a-koloron, tro fermita o prezentas u-koloron.

Koncerne la longecon de la vokaloj, ni tuŝas la estetikan flankon de la elparolado. Ankaŭ ĉi tie Zamenhof ne sentis bezonon dekreti tro precizajn regulojn, lasante al la arta sento de la uzantoj la taskon trovi kontentigan solvon. Trolongigo de la vokaloj, precipe en la neakcentitaj silaboj, efektas malbele; ankoraŭ pli la diftongigo de la vokaloj al kio tendencas niaj anglaj samideanoj. Entute pli gravas sin demandi kial esperanto fluas tiel agrable el la buŝo de K-do A kaj kial ĝi tiom tede efektas el la buŝo de K-do B. Oni alvenos al la konkludo ke, senkonsidere pri la persona prononco fontas el la nacilingvaj kutimoj, kiuj forte influas al nia parolo. Ekzemple malrespekto al la regula akcento fare de franclingvano, transporto en la esperantan frazon de la melodio de la responda nacilingva frazo. Tiu melodio, kiuj estas kuriozaj apartaĵoj ne nur de ĉiu lingvo, sed ankaŭ de apartaj dialektoj, fremde aspektas en unueciga lingvo. Ilin tute forigi el esperanto povas ŝajni nek eble nek dezirinde pro la pitoresko, kiun ili alportas; tamen estas nekonsilinde ilin intence akcenti malgraŭ ilia ĉarmo kaj koloro, pro timo al tedeco kaj senutila balasto en antaŭ ĉio simpla esprimilo.

(S.A., aŭg.52)

* *
*

 * LA VORTO *

LA GRAMATIKA KARAKTERO

 DE LA RADIKO

La esperanto-vortfarado baziĝas sur la gramatika karaktero de la radiko. Radiko havas substantivan karakteron, alia verban, alia adjektivan. En kazo de dubo, oni konsultu la P.V.

1° Substantivaj radikoj.

Ekzemple domo, tablo, libro. En tiuj vortoj, la finaĵo "o" estas pleonasma kaj signas nur la gramatikan rolon de la vorto. Se oni deziras per tiuj radikoj pluformi verbojn aŭ adjektivojn, oni povos tion fari ĝenerale, ne nur per simpla ŝanĝo de "o" al "i" aŭ "a", sed per helpo de taŭgaj radikoj aŭ sufiksoj. La adjektivoj formitaj el tiuj radikoj sen helpo de sufikso povas roli nur kiel determinantoj.

Tabla piedo = Piedo de tablo. Doma besto = Besto de domo, sed neniam kiel kvalifikantoj. En tiu kazo oni devas uzi la sufikson "ec".

Besteca rigardo = rigardo kiu havas la kvaliton de besta rigardo. Oleeca fluidaĵo = Fluidaĵo kiu havas la kvaliton de la oleo.

En la verboj pluformitaj el tiuj radikoj, la finaĵo "i" ne havas nur gramatikan karakteron sed valoron de konsistiga elemento, kun la signifo : fari, doni, meti...

Formi = doni formon. Ordi = meti en ordo (ordigi).

Profesori = agi kiel profesoro (instrui).

Tiajn vortojn oni ne renkontas ofte en la lingvo; oni uzu ilin, nur kiam ilia senco estas klara kaj nepridubbla.

2° Verbaj radikoj.

En tiuj vortoj, la finaĵo "i" estas pleonasma kaj indikas nur la gramatikan rolon de la vorto : Dormi, vekti, labori, promeni.

Se oni anstataŭigas la finaĵon "i" per "o", oni ricevas la nomon de la ago. Ekz. dormo = ago dormi; laboro = ago labori.

En tiuj substantivoj superfluas la sufikso "ad", kies senco estas jam entenata en la radiko. Ties uzo aldonus al la substantivo ideon de ripeto aŭ longa daŭro :
dormado = longa dormo.

Kun la verbaj radikoj la finaĵo "a" havas ofte la sencon de participo. Ekz. : sekva = sekvanta; skriba = skribita. Kiam oni deziras precizon, oni uzu prefere la participojn, aŭ aldonu precizigan flankelementon : perlabora vivteno; dumpromena babilado.

3° Adjektivaj radikoj.

Ekz. : rapida, longa, ruĝa. En tiuj vortoj la finaĵo "a" signas nur la gramatikan karakteron de la vorto. Simpla anstataŭigo de "a" per "o" formas substantivojn, kiuj nomas la kvaliton konsideratan kiel abstraktaĵon. Belo, honesto, longo. Se oni atribuas tiun kvaliton al aparta kazo, oni uzu la sufikson "ec". Ekz. : la rapideco de la veturilo. Por ricevi la konkretajn signifojn de la radiko, oni uzu la sufiksojn "aĵ" por la materialaĵoj, kaj "ul" por la personoj. Oni devas eviti la uzon de la sufikso "ec", kiam temas nur pri la simpla nomo de la abstrakta kvalito. Ekz. : La principo pri neceso kaj sufiĉo (ne neceseco kaj sufiĉeco). Sed oni diru : "la neceseco" de tiu sufikso en tiu vorto estas evidenta.

Se oni anstataŭigas la finaĵon "a" per "i", oni ricevas verbojn, kiuj signas ne agojn, sed statojn (esti...a).
La ĉielo ruĝas = la ĉielo estas ruĝa.
La afero ne urĝas = la afero ne estas urĝa.

(E.L., dec.1945)

P R I V O R T - K U N M E T O

En vort-kunmetaĵoj oni devas distingi la ĉefelementon, kiu entenas la ĉefan ideon esprimatan de la tuta vorto, kaj la flankelementojn, kiuj algluiĝas al la ĉefa por pliprecizigi ties sencon. La ĉefelemento ĉiam staras ĉe la fino de la kunmetaĵo kaj la flankelementoj antaŭe.

La ĉefelemento povas esti :

1° Radiko. Ekz. : manĝoĉambro estas ĉambro, kiu servas por manĝo.

2° Sufiksoido, t.e. sufikso kiu havas la saman valoron kiel radiko. Ekz. : Vaporŝipestro estas estro de ŝipo movata de la vaporo.

La veraj afiksoj : mal, et, eg, aĉ, fi, pra, en la vortkunmeto ne havas rolon de radikoj, sed modifas la sencon de la radikoj al kiuj ili gluiĝas. Ekz.: Pordeto ne estas eto de pordo, sed speciala pordo, malgranda pordo, dum en la vorto "pordisto", la sufikso "ist" ludas rolon de radiko. Pordisto estas zorganto de pordo, isto kiu okupiĝas pri la pordoj.

3° Gramatika finaĵo. En la vorto "perlabori", la gramatika finaĵo "i" ludas rolon de radiko. Ĝi signifas "akiri". Perlabori = per laboro-i aŭ ricevi per laboro. Same "grandskala" ekvivalentas al granda skalo-a, t.e. karakterizata de granda skalo.

Kiam la vort-efiko efektiviĝas de dekstre maldekstren, ĝi estas nomata rekta vortefiko, kiel okazas en la vorto "vaporŝipestro", "ventmuelilo", ilo kiu muelas per la vento.

Povas esti, ke tiun procezon oni ne povas apliki al kategorio de kunmetaĵoj, precipe al tiuj, kies komencelemento estas numeralo aŭ prepozicio. Ekz.: senfortulo; ĉirkaŭurba, centjara; multinfana, ktp. Senfortulo = sen forto-a-ulo, t.e. ulo karakterizata de senforteco.

Ĉirkaŭurba = Ĉirkaŭ urbo-o-a, en kiu la "o" signifas proksimume "kvartaloj". Do : kiu rilatas al kvartaloj aŭ urbpartoj kuŝantaj ĉirkaŭ la urbo.

Multinfana = multaj infanoj-a; do, kiu estas karakterizata de multaj infanoj.

Centjaro = Cent jaroj-o, periodo ampleksanta cent jarojn.

En tiuj vortoj, la unua elemento kunkroĉiĝas kun la dua kaj ne estas ties determinanto. Oni diras, ke la vortefiko estas inversa, pro tio, ke ĝi ne obeas la ĝeneralan regulon.

Oni provis kritiki tiujn formojn, ĝuste pro tio, ke ili ne obeas la ĝeneralan rektan vortefikon. Ekzemple iuj provis anstataŭigi "centjaro"n per "jarcento", en kiu vorto la vortefiko estas rekta. Sed jam tiele enradikiĝis en la lingvon tiuj formoj, ke estus vane peni ilin elkonduki.

En la formado de kunmetaĵoj, povas esti ĝi elementoj nevideblaj, kiujn malkaŝas nur la analizo, ekz. la signo de la pluralo en "multinfana", "interkontinenta".

Multinfana = multaj infanoj-a . Interkontinenta = inter kontinentoj-a . Ĉirkaŭurba = ĉirkaŭ urbo-o-a.

En la formado de kunmetaĵoj, oni devas memori, ke substantivo ĉiam estas determinanto de substantivo kaj ne de adjektivo.

Flankelemento, eĉ konsistanta el adjektiveca radiko, ne povas kvalifiki la ĉefelementon. Ekz.: varmradio ne estas varma radio sed radio de varmo. Multaj esperantistoj tendencas kunmeti substantivon kun ties kvalifikilo. Tio estas eraro en la nuna evolustato de la lingvo. Ĝis nun oni tion faris por kelkaj vortoj, sed tiam la ricevitaj formoj havas specialan sencion nuance diferencon de la analiza formo. Ekz.: dikfingro ne estas dika fingro sed speciala fingro. Junedzo ne estas juna edzo, sed novedziĝinta edzo. En tiaj kunmetoj, ŝajnas ke la adjektiva radiko agas prefikse, do modifante la sencion de la radiko, al kiu ĝi algluiĝas.

(E.L., feb.46)

Jen kelkaj komune uzataj vortoj, en kiuj la adjektiva flankelemento rolas kiel prefikso :

Fremdlando, grandurbo, ĝentilhomino, junedzo (ino), krudmaterialo, mezepoko, Nordafriko, plenmano, rapidvagonaro, sekvinbero, solfilo, sovaĝbesto, duonhoro.

Oni rimarku, ke tiuj vortoj havas specialan derivitan sencion, kiu diferencas de la respektiva analiza formo : adjektivo + substantivo.

Estus do erare, pretekste de analogio, formi tiajn kunmetaĵojn kiaj : fremdurbo, grandvilaĝo, ĝentilinfano, rapidĉevalo, novlibro, ktp. La formo tutmondo, en kiu la adjektivo "tuta" estas prefiksita, ne pravigas la vortojn tuturbo aŭ tutkoro. Sed tiuj formoj povas esti uzataj, se ni ekzemple ilin adverbigas per la finaĵo "e". Tiam ili fariĝas trielementaj kunmetaĵoj en kiuj agas la inversa vortefiko (maldekstre-dekstre) por la du unuaj elementoj. Ili estas tuturbe konataj. Mi salutas vin tutkore.

Tuturbe = (tuta urbo)e = en la tuta urbo.

Tutkore = (tuta koro)e = el la tuta koro.

Tio, kio mi ĵus diris pri la kunmetaĵoj : adjektivo + substantivo, validas ankaŭ kun la kunmetaĵoj : adverbo + adjektivo aŭ adverbo + verbo. Anstataŭ prefiksigi adjektivan radikon antaŭ adjektivo aŭ verbo, oni nepre uzu la respektivajn analizajn formojn. Ekz.: anstataŭ "tutpreta" oni diru "tute preta"; anstataŭ "krudkondukti", oni diru "krude kondukti"; anstataŭ ruzagi, ruzi agi, ktp. La strikta oboe

al tiuj konsiloj estas nepra kondiĉo de la bona stilo.

(E.L., feb.50)

A F I K S O J

U L . Demando. En "Insulo de feliĉuloj" incitis min la unua frazo : "La trimastulo 'Sveda Leono' jam suprentiris la blindvelon...". Ĉu konsilinde estas uzi la sufikson UL ĉe nomoj de nevivantaj aĵoj ? Mi pensas, ke ne. La esperanta-franca vortaro de Waringhien enhavas la vorton "trimasto". Responde. Ĉi tie oni devas distingi teorion kaj praktikon. Teorie la sufikso UL aplikiĝas nur al vivantaj estuloj, same kiel AĴ aplikiĝas al ĉiuj ceteraj kazoj. Oni do devus diri "trimastaĵo", "nubskrapaĵo", ktp. Oni tuj divenas, ke en la formoj "trimastulo", "nubskrapulo", oni aplikas metaforojn, kiuj personigas nevivantaĵojn. Malpermesi tiujn metaforojn estus senigi la lingvon je riĉa fonto, kiu ĝin vivantigas, kiu al ĝi donas koloron. La angla lingvo personigas la ŝipojn per la uzo de la insekta pronomo. En la franca oni debatas pri ilia sekso, kio estas komenco de personigo. Uzante la formon "trimasto", oni simple aplikas la principon pri neceso kaj sufiĉo kaj per tio evitas la problemon.

(S.A., nov.58)

D.: En konversacioj mi ofte aŭdis la vortojn : konatulo, burĝulo, nobelulo, ktp, anstataŭ konato, burĝo, nobelo, ktp. Ĉu tiuj formoj estas akcepteblaj ?

En legaĵoj kaj ankaŭ en konversacioj mi ne malofte renkontis la vortojn : patrulo (pastro, monaĥo), patrolino (monaĥejestrino), fratulo (monaĥo), fratulino (monaĥino). Ĉu tiuj formoj estas konstruitaj laŭ la fundamentaj principoj, kaj se ne, ĉu ili povas esti tamen akceptataj ?

R.: La sufikso UL signas individuon, kies karakteriza kvalito estas esprimita de la flankelemento. Se tiu flankelemento estas substantivo, oni konsideras ties karakterizan kvaliton. En tiu ĉi kazo la sufikso "ec" estas latente entenata en la kunmeto. Ekz.: almozulo = ulo karakterizata de almozeco; ĝibulo = ulo karakterizata de ĝibeco. Evidentiĝas, ke, se la flankelemento esprimas mem individuon, la sufikso "ul" estas pleonasma kaj senutila balasto. Tiaj vortoj, kiaj konatulo, burĝulo, nobelulo anstataŭ konato, burĝo, nobelo, estas malbonstilaj kaj evitindaj.

Tamen se oni deziras doni al la ul-kunmeto specialan senco, nuancon kiun la simpla radiko ne povas esprimi, oni povas ĝin uzi en jenaj kazoj : 1° se la ĝenerala lingvo-uzo jam akceptis ĝin kun tiu senco; 2° se la kunteksto sufiĉe klare elvokas tiun nuancon.

Ekzemple, en la religia fakterminaro, oni trovas la vortojn patrulo, patrulino, fratulo, fratulino kun la respektivaj sencoj de pastro, monaĥejestrino, monaĥo, monaĥino. Tiuj vortoj estas analizeblaj per la aldono de la subkomprenita ideo : laŭ la eklezia rito. Patrulo = ulo karakterizata de spirita patreco; fratulo = ulo karakterizata de spirita frateco, ktp. Se la kunteksto permesas, oni povas uzi la vorton "burgulo" ne kun la senco de "burĝo", sed kun la senco de : ulo karakterizata de burĝeco, ekzemple laboristo, kiu vivas kaj kondutas burĝece, kaj tamen ne estas burĝo.

Post substantivoj-participoj, kiuj jam signas personojn, validas la samaj rimarkoj. Zamenhof uzis la vorton "instruitulo" donante al tiu vorto la senco de "klerulo", tute malsama de tiu de "instruito" (homo, kiun oni instruis, sed kiu povis resti neklera) : "Dancu la dancisto, muziku la muzikisto, sed instru nur la instruituloj."
(S.A., okt.51)

I Ĝ. D.: En la poemo "Filino de Iftah" el la Fundamenta Krestomatio, oni legas la versojn :

Ben Jair mortigas kun ŝtono en brusto,

Kaj Gilad droniĝas en sango.

Ĉu korekta la aldono de "iĝ" ĉe la radiko de verbo ne-transitiva ?

R.: Estas nenia kaŭzo kial oni ne uzu la sufikson "iĝ" kun ne-transitivaj verboj. Post la statverboj sidi, stari, kuŝi, kaŭri... ĝi signas ŝanĝon de stato. Post la agverboj ĝi montras la evoluon de la stato en kiu troviĝas la subjekto dum efektiviĝas la koncerna ago, do ankaŭ ŝanĝon de stato. Morti kaj droni per si mem esprimas nedaŭran agon. Mortiĝi kaj droniĝi esprimas krome nuancon de evoluo en la ago.

(S.A., dec.58)

OBLE/FOJE. D.: "La urbo estas trifoje pli vasta." Ĉu tiu frazo estas korekta ?

R.: La vortoj (du, tri, kvar...)-foje montras, ke iu nombro estas ripetata aŭ iu fakto estas okazanta (du, tri,

kvar...)foje, sed se oni konsideras la rezultan kvanton de pliampleksigo, oni uzu la sufikson "obl". "La urbo estas trioble pli granda."

D.: Mi legas : "Meza Afrikano gajnas dekfoje malpli ol meza Eŭropano en lando, kie la prezoj estas dufoje pli altaj."

Ĉu la uzo de DEKFOJE kaj DUFOJE estas ĉi tie korekta ? Laŭ mi tio estas aĉaj francismoj !

R.: Vi tute pravas, kvankam mi ne konsentas pri la aĉeco de tiuj francismoj, kiuj cetere estas ankaŭ anglismoj. Oni ne postulu de idiomaĵo la logikon de Esperanto, ĉar ĝi ne estus plu idiomaĵo. En klara Esperanto mi dirus : "Meza Afrikano gajnas la dekonon de tio, kion gajnas meza Eŭropano en lando, kie la prezoj atingas la duoblon."

(S.A., feb.59, nov.64)

I O (por landnomoj)

Jam fluis tiom da inko koncerne la problemon pri landnomoj, ke oni povas sin demandi, ĉu necesas refreŝigi ĝin per pluaj komentoj kaj revigligi la epopeajn batalojn, kiujn ĝi estigis. La nunajn esperantistojn ĝenerale kontentigas "modus vivandi", kiun, pro la neeblo ricevi plenan logikan solvon, ili tolereme respektas. La enkonduko de la finaĵo IO por montri la landnomojn estis siatempe konsiderata kiel hereza kaj atencanta kontraŭ la netuŝebla fundamento. Hodler, iama gvidanto de UEA estis anatemata kaj post ties morto, UEA devis pentofari kaj reveni al la fundamenta sufikso UJ. Malgraŭ la kontraŭstaro de la lingvaj instancoj, SAT persistis uzadi la nekonsekritan sufikson. En la plimulto el la artikoloj koncernantaj la UJO-IO-batalon, oni parolas pri kontraŭfundamenta derivigo de la landnomoj elde geografiaj radikoj. Tiel prezentita la demando ne povis ricevi aprobon de la Lingva Komitato, ĉar anstataŭigo de afikso per alia estus alportinta gravan rompon en la fundamento.

Se oni zorge priatentas la regulojn de la esperanta vortfardo, la finaĵo IO ne devas kaj eĉ ne povas esti konsiderata kiel sufiksoido. Komuna karaktero de la esperantaj afiksoj estas, ke ili povas esti uzataj memstare kiel veraj radikoj, alprenante la necesajn gramatikajn finaĵojn. La enklasigo de IO kiel sufikso alportus rompon en tiu senescepta regulo. Estas pli logike kaj simple konsideri la landnomojn Francio, Germanio, kiel unuelementajn vortojn, en kiuj Franci' kaj Germani' estas aliaj formoj de la fundamentaj Franc' kaj

German' signas gentojn. Komparu "kirurg'" (persono) kaj "kirurgi'" (scienco), "geograf'" (persono) kaj "geografi'" (scienco), "arĥitekt'" (persono) kaj "arĥitektur'" (arto) ktp. Tiu solvo estas tute konforma al la nuna evoluo de la lingvo kaj ne postulas oficialigon de nova sufikso, kiu ja ne povas esti sufikso. Ĝi enkondukas nur neologismojn, kiuj, laŭ la penso de Zamenhof, ne elpuŝas la fundamentajn formojn, sed kies enkondukon povas pravigi la pli kaj pli ofta uzado.

Por la malnovaj landoj ni do disponas pri du radikoj, el kiuj unu servas por nomi la genton kaj la alia por nomi la landon. Mi uzas la okazon por atentigi novlernintajn kamaradojn pri la erara uzado de tiaj formoj : Francano, Svedano, kiuj havas nenian sencan. Nur du formoj estas uzablaj : Franco estas individuo kies genta aparteneco estas franca, kaj Franciano estas individuo kiu, senkonsidere pri lia genta aparteneco, loĝas en Francio aŭ posedas la francan ŝtatanecan.

La sola, kion oni povas prezenti kontraŭ tiu ĉi vidmaniero estas, ke tiuj novaj formoj ne estas internaciaj, do per si mem enkondukeblaj laŭ la 15-a regulo de nia gramatiko. Ili bezonas esti sankciitaj de la uzado por ricevi oficialigon; sed oni sciu, ke internacia lingvo povas esti nur kompromiso inter skemeco kaj natureco. Kontraŭe al la novaj projektoj, kiuj preferas naturecon al simpleco kaj reguleco, Esperanto devis ofte rezigni naturecon por konservi la plej eblan simplecon. Ankaŭ en ĉi tiu speciala problemo oni ne rezignu pri la avantaĝo, kiun donas al ni la fleksebleco de nia lingvo. Zamenhof iam prave admonis : "Memoru ĉiam, ke Esperanto devas sin alkonformigi ne al la gustoj de ĝiaj flankaj rigardantoj, sed al la oportuneco de ĝiaj efektivaj uzantoj".

(S.A., apr.52)

L A

D.: Dum legado de libro tradukita el la angla, mi renkontis sur la sama paĝo la du formojn : "la valo de la Thames" kaj "la valo de Thames". Kiu formo estas korekta ?

R.: La uzo de la artikolo antaŭ propraj nomoj estas tre diversa laŭ la aŭtoroj. Principe tiuj substantivoj ne be-

zonas artikolon, ĉar ili estas per si mem sufiĉe difinitaj. Oni diru : "la valo de Thames" aŭ prefere "la valo de Tamizo", ĉar ne ĉiuj esperantistoj konas la anglan nomon de tiu rivero. Se oni timas nekomprenon pri la naturo de la propra nomo, oni ĝin antaŭigu per la koncerna komuna nomo kun artikolo. Ekz. : "La valo de la riverego Tamizo". "La verdindaĵoj de la urbo Limoĝo".

Se la senco de la propra nomo estas limigita aŭ plipre-
cizigita per adjektivo, suplemento aŭ eksplika subpropozicio,
tiam oni uzu la artikolon. Ekz. : "Li vojaĝis tra la tuta Eŭ-
ropo". "La tiama Francio tre diferencis de la hodiaŭa".

(S.A., jan.53)

D.: Mi legis : "En la lasta numero de SAT-Amikaro mi trovas
la jenan frazon...". Ĉu "jenan frazon" ne sufiĉas ? Se oni
anstataŭigus jenan per tiun, certe ne venus la penso skribi
"la tiun frazon". Ĉu tio ne estas nacia idiotismo ?

R.: La adverbo JEN estas nur atentigilo pri io (aŭ iu) pri kio
(aŭ kiu) oni parolas aŭ tuj parolos, sed ne specifa demonstra-
tivo. La demonstrativo estas plej ofte subkompremita. Ekz. :
"Jen (tio) kio ĉagrenas min." La derivita adjektivo JENA
ludas la saman atentigan rolon antaŭ substantivo kaj la subst-
antivo JENO en la propozicio (JENO = la "o" pri kiu oni
atentigas). Do ne ekzistas logika kaŭzo, kial oni ne uzu la
artikolon antaŭ tiuj vortoj kaj kial oni ne diru : "la jena
epoko" same kiel oni diras "la nuna epoko".

Sed la lingva tradicio (Ho! Lanti, pardonu min!) identigis la
adjektivon JENA kun la ordinaraj montraj vortoj pro la granda
parenceco de la du ideoj : atentigo kaj montrito. La P.V. sank-
ciis tiun identigon per tiu ĉi difino de JENA : montra adjek-
tivo signifanta : tiu sekvanta. Ĉar la demonstrativoj ne to-
leras la uzadon de la artikolo antaŭ si, oni konsekvence ne
devas uzi "la" antaŭ "jena".

Konklude, laŭ tio, ĉu oni obeas la striktan logikon aŭ simple
sekvas la lingvan tradicion, oni alvenas al malsamaj solvoj.
Tiu konflikto mi jam ĉi tie akcentis koncerne la demandon
"Ĉu oni uzu la akuzativon post ĉe ?" Se mi volas resti konsek-
venca, mi devas konfesi mian herezon kaj konsili "Ne uzu la
artikolon antaŭ JENA; Zamenhof konsilis en dubaj okazoj, ne
uzi la artikolon kaj lingva unueco estas pli grava ol tro
granda strebo al logiko. Tio ne malhelpos konservi mian opi-
nion kaj murmurati same kiel faris Galilei en pli tragikaj
circonstancoj : "Kaj tamen ĝi moviĝas".

(S.A., jul.51)

K O R E L A T I V O J

K I O / K I U ...

D.: Tio, tiu, ktp, ofte konfuziĝas en mia kapo. Ekz.: "La kongreso okazis en unu sola ĉambro, kiu multe helpis al la sukceso" kaj... "en unu sola ĉambro, kio tre helpis al la sukceso". KIU kaj KIO estas pronomoj kaj la reprezentato en la du kazoj estas aĵo. Kia estas la diferenco inter la du frazoj ?

R.: La ĝusta kompreno de la tabelvortoj estas tre grava en Esperanto; ĝuste pro tio la rektmetodaj kursoj akcentas pri ilia korekta uzado.

La perkorespondaj kursoj kaj entute la gramatika metodo ne povas tiel sukcese komprenigi al la lernanto ilian veran sencon, precipe ne la diferencigon inter la o-vortoj kaj la u-vortoj.

La o-vortoj : kio, tio, io, ĉio, nenio, estas ofte nomataj pronomoj. Se paroli la veron, ili neniam anstataŭas substantivon; pli ĝuste oni nomu ilin pseŭdosubstantivoj (o-finaĵo). La demandvorto KIO demandas pri la naturo aŭ la kategorio de ĉiuj estaĵoj, en la plej ampleksa senco de ĉi tiu vorto, homoj, bestoj, aĵoj. Ekz.: Kion vi alportas al mi ? - Ion (nedifinita), tion (mi montras), ĉion (la tuton de la petitaĵoj), nenion (nea respondo).

La u-vortoj : kiu, tiu, iu, ĉiu, neniu, individuigas la estaĵojn interne de pli-malpli ampleksa grupo. La nomo de tiu grupo povas esti esprimita aŭ subkomprenita. La subkomprenon helpas la kunteksto aŭ la cirkonstancoj. Kiam ĉi tiuj ne povas helpi oni subkomprenas la vorton "homo".

Ekz.: Kiun libron vi alportis ? - Iun (nedifinita), tiun (mi montras), ĉiujn (la tuton de la petitaj libroj), nenium (nea respondo). La u-vortoj do estas adjektivoj, kiam la nomo de la grupo estas esprimita, kaj pronomoj, kiam tiu nomo estas subkomprenita. Ekz.: "Kiu (homo) alfrapas la pordon ? - Henriko." Supoze, ke mi jam parolis pri mordemaj hundoj, mi demandas : "Kiu (hundo) mordis vian amikon ? Tiu (mi montras), neniu (nea respondo), la hundon de Paŭlo (mi individuigas per suplemento).

Uzataj kiel rilataj pronomoj, KIO respondas al TIO kaj KIU respondas al TIU. Ekz.: La kongreso okazis en unu sola ĉambro; tio tre helpis al la sukceso. La kongreso okazis

en unu sola ĉambro; tiu ĉambro estis disponigita al la kongresanoj de la urbestro. Se oni kunligas ambaŭ propoziciojn, kiuj konsistigas ĉiun el tiuj du frazoj, oni ricevas :

1° La kongreso okazis en unu sola ĉambro, kiu tre helpis al la sukceso.

2° La kongreso okazis en unu sola ĉambro, kiu estis disponigita al la kongresanoj de la urbestro.

TIO, same kiel KIO resumas la ideon esprimitan en la antaŭa propozicio, dum TIU kaj KIU anstataŭas la antaŭan substantivon. Por eviti miskomprenon, ili devas kuŝi kiel eble plej proksime al tiu substantivo.

Noto por la instruantoj. Estas tute erare kredi kaj maltrafe instrui, ke la u-vortoj rilatas nur al personoj kaj la o-vortoj rilatas al aĵoj. Tiu diferencigo estas tute arbitra kaj ne ludas rolon en la tabela klasifiko. La o-vortoj estas substantivoj, kiuj atentigas nur pri la naturo aŭ kategorio de la koncernaj estaĵoj kaj la u-vortoj estas adjektivoj aŭ pronomoj (laŭ la strikta senco de tiu vorto), kiuj atentigas pri ilia individueco meze de grupo.

(S.A., mar.50)

Iuj esp. instruantoj, verŝajne influitaj de sia patra lingvo, enkondukas en sian instruon la saman diferencigon kaj ekvivalentigas "kiu" al fr. qui, angl. who, germ. wer, kaj "kio" al fr. quoi, angl. what, germ. was... Tion farante ili erarigas siajn lernantojn, ĉar la diferenco inter "kiu" kaj "kio" kuŝas sur tute alia bazo ol la diferenco inter "qui" kaj "quoi", "who" kaj "what", "wer" kaj "was". Per "kiu" oni tute ne demandas pri la persono kiu agas, sed pri la individuigo de la aganto, kiu ajn estas ties naturo : homo, besto aŭ aĵo, depende de la cirkonstancoj aŭ de la ĉirkaŭteksto.

Per "kio" oni demandas pri la naturo de la pridemanditaĵo, kiu povas esti same bone homo, besto aŭ aĵo. Kiam oni demandas per "kiu" oni jam estas informita pri la naturo de la koncernaĵo; mankas nur ties individueco. Se mi demandas "Kiu skrapas ĉe la pordo", nur la cirkonstancoj povas diri al mi ĉu "kiu" rilatas al homo aŭ al besto aŭ eĉ al aĵo. Ekz. se mi gastas ĉe amiko kiu posedas du aŭ tri katojn kaj se mi estas certa ke nur kato povas kaŭzi la skrapon, "kiu" rilatos al besto, ĉar mi jam estas informita pri la naturo de la bruoj kaj mi deziras esti informita nur pri la individueco de la skrapanto.

Se mia gastiganto posedas neniun katon, kaj se mi estas certa,

ke nur homo povas esti la skrapanto, "kiu" rilatos al homo. Precipe mi neniam demandos per "kiu" se mi ne estas antaŭe informita pri la naturo de la aganto.

Kiam mi demandas "kio blovas ?", infano povas prave respondi "la vento blovas". En tiu kazo "kio" rilatas al aĵo. Sed, se okaze de societa ludo, mi demandas al iu el la ludantoj : "kio stultas ?", ĉu estos riproĉinde se la demandito respondos : "la homo stultas" ? Ĉu en tiu demando "kio" ne rilatas al homo ?

Diri ke "kiu" rilatas al personoj kaj "kio" al bestoj aŭ objektoj estas nura imitado de niaj bedaŭrindaj nacilingvaj kutimoj; tiu regulo postulas, ke oni konu la respondon antaŭ ol demandi, kaj se oni konas la respondon, kial necesas demandi ?

Resume la U-tabelvortoj ĉiam subkomprenigas pli ampleksan kolektivon el kiu estas eltirita la pridemanditaĵo. Ili rilatas al personoj en la mezuro en kiu la cirkonstancoj aŭ la ĉirkaŭteksto ne neprigas ilian apartenecon al aliaj grupoj.

KIU demandas pri elekto el inter samnaturaj unuoj (tute egale ĉu tiuj unuoj estas personoj, bestoj aŭ aĵoj).

KIO demandas pri la naturo de tiuj unuoj.

Koncerne la uzadon de "kio" en la pluralo, mi ne opinias, ke tio estas konsilinda. La naturo de io estas unueca kaj tute ne individuigebla. Kiam mi demandas pri la naturo de la tabloj, mi ne vidas la meblojn mem, sed la pli ĝeneralan vorton, kiu esprimas la kategorion al kiu ili apartenas. La akordigo de la predikativa vorto estas nur gramatika afero.

(S.A., feb.57)

K I A / K I E L

D.: En la marta numero de SAT-Amikaro mi legas sur la frontpaĝo : "...kun dramaj poetoj kiaj Corneille; kun verkistoj, kia Gustave Flaubert; kun filozofoj, kia Fontenelle, ktp" Ĉu en tiu frazo la vorto KIA estas korekte uzata ?

R.: Tiu uzo de KIA en la ĉi-supra ekzemplo, anstataŭ la Zamenhofa KIEL, plej trafe ekzemplas tion, kion DE HOOG en sia libro "Du malsanoj en Esperanto" nomas la KIA-ismo. En la citita frazo KIA havas nur klasifikan funkcion, t.e. la persono aŭ afero indikitaj per la substantivo enkondukita per tiu vorto ekzemplas la samkategoriajn personojn aŭ aferojn. Tiu ligvorto do havas prepozician karakteron, kio tu-

te kontraŭas al ĝia adjektiva naturo. Adjektivo povas roli nur kiel epiteto aŭ predikativo rilate al substantivo.

Tiu frazo devus teksti : "...dramaj poetoj KIEL Corneille; verkistoj KIEL G. Flaubert; filozofoj KIEL Fontenelle, ktp" (S.A., apr.63)

K I E S

D.: En "El Popola Ĉinio" mi legas : "...kun siaj tridek kvin vilaĝoj, siaj tridek mil loĝantoj, KIES naŭ mil plene kaj kvar mil nur parte laboras..." Ĉu la vorto KIES estas korekte uzita?

R.: KIES signifas nur "de kiu" kun poseda aŭ aparteneca senco kaj neniam povas signifi "el kiu, pri kiu". La korekta frazo tekstus : "...el kiuj naŭ mil plene laboras." Cetere pli supre la vorto KIES estas korekte uzita : "...ĝi estas ludata de tri mil artistoj, el kiuj du mil gejunuloj kantis kantojn". (S.A., nov.65)

T I E L / T I O M

D.: Mi legas tiun frazon : "Tiom longe kiam la ŝipo kuŝas en la haveno, la pasaĝeroj havas la rajton iri en la urbon." Ĉu tiu uzo de "tiom...kiam" estas korekta ?

R.: En tiu ĉi frazo oni komparas du tempodaŭrojn, kiujn oni taksas egalaj.

Unua tempodaŭro : "Kiel longe la ŝipo kuŝas en la haveno".

Dua tempodaŭro : " tiel longe la pasaĝeroj rajtas iri en la urbon".

Por eviti la ripeton de la vorto "longe", la frazo kuntiriĝas jene : "Tiel longe kiel la ŝipo kuŝas en la haveno, la pasaĝeroj havas la rajton iri en la urbon".

Se oni ne deziras akcenti la egalecon de la tempoj, oni diru tute simple : "Dum la ŝipo kuŝas en la haveno, la pasaĝeroj rajtas iri en la urbon". Intera formo tekstus jene : "Tiel longe dum la ŝipo kuŝas en la haveno, la pasaĝeroj rajtas iri en la urbon".

Ĉu utilas cerbumi por trovi laŭdire pli logikajn (?) formojn kaj akuŝi tiajn monstraĵojn, kiujn ekzemplas la ĉi-supra frazo.

(S.A., jul.64)

I U / C E R T A

D.: Mi legis la sekvantajn frazojn : "La rapida kaj en certaj okazoj perforta akcepto de la kristanismo komencis doni siajn rezultojn... Aperis certa dukredo : adorado de la paganaj dioj de patro kaj prapatroj kune kun adorado de la kristanaj sanktuloj". Ĉu tiu uzo de "certa" estas korekta kaj konsilinda en la senco, kiun ĝi havas en tiuj frazoj ?

R.: En tiuj frazoj "certa" havas la senco 3 de la P.V., nome : difinebla sed ne difinita, ĉar oni ne volas aŭ ne bezonas difini. La P.V. aldonas kiel RIM. Pli bone en tiu senco uzi la esprimojn iu, ia, aŭ kelka, ioma, por eviti konfuzon kun la sencoj 1 kaj 2.

En siaj Lingvaj Respondoj (p.54) Zamenhof skribas :

"Krom sia ĉefa senco, la vorto "certa" havas ankoraŭ la senco de "iu" (ne en la senco de "kiu ajn", sed en la senco de "iu difinita"; la uzado de "certa" en la senco de "iu" tute ne estas franclingvaĵo, ĉar tiel same oni uzas tiun vorton en la lingvoj germana, rusa, pola kaj aliaj."

Kvankam la P.V. pritraktis la diversajn sencojn de la vorto "certa" en la sama artikolo, oni povus diri, ke en la realo, ni staras antaŭ du tute malsamaj vortoj, kiuj havas nenian komunan parencecon, tiom diferencas la tria senco disde la aliaj (ĝi preskaŭ esprimas la malon!).

Estas ĝenerale akceptite, ke oni evitu alpreni la samajn formojn por esprimi ideojn, kiuj havas nenion komunan, kun la celo forigi ĉian malklaron aŭ miskomprenon. La uzo de "certa" en la tria senco tute kontraŭas tiun principon; sed ĝin elpeli el la lingvo estas jam tro malfrue, ne nur pro la eksplicita klarigo de la lingvo, sed ankaŭ pro ĝia ĝenerala enkonduko en la literaturon. La plej bona, kion ni povas fari estas bojkoti tiun senutilan vorton laŭ la konsilo donita de la P.V.

(S.A., okt.58)

P R E D I K A T O

L A A D J E K T I V O

D.: En miaj legaĵoj mi renkontis tiujn ĉi frazojn : "Mi batis tiun viron kripla. Li lavos vin pli pura ol neĝo." Tiuj esprimmanieroj ŝajnas al mi nekutimaj; ĉu ili estas bonstilaj ?

R.: Tiuj frazoj estas tipaj ekzemploj de objekta predikato,

en kiuj la koncerna kvalito aŭ stato estas ne simple atribuita al la objekto, sed altrudita al ĝi pere de drastesprima ag-vorto. Komparu la du frazojn :

Mi vidis lin kripla kaj Mi batis lin kripla.

Inter ĉi tiuj frazoj ekzistas nur grado de atribuo. Ili estas ne nur korektaj, sed tute kongruas kun la spirito de nia lingvo.

(S.A., aŭg.51)

ADJEKTIVO aŭ ADVERBO ?

D.: Mia lernantino starigas antaŭ mi la jenan demandon, kiun mi ne povas solvi, des pli ke mi ne posedas la P.G.

Mi opinias utila represi la respondo de Zamenhof. (Leteroj de Zam.). Sed aĉeti la kastelon de Chambord mi ne opinias bona. Ŝi trovas nekonsekvenca uzi : Manĝi estas utile. Mi opinias utila.

R.: Kvankam la opinio de la P.G. estas konsiderinda, oni povas mem klarigi al si tiun ĉi nekonsekvencaĵon.

En la frazo : "Manĝi estas utile", la senco estas klara. "Utile" funkcias predikative al la infinitivo "manĝi".

Se mi diras "Mi opinias utile represi..." la vorto "utile" pro sia situacio inter du verboj povas alpreni diversajn funkciojn. Krom la intencita senco kiel predikativo de "reprezi", ĝi povas ankaŭ agi adverbe al tiu sama verbo kaj eĉ al la verbo "opinii". Tiu frazo do havas tri sencojn. Por forigi tiun trisencecon, oni uzas la adjektivan formon, kiu estas tre klara.

Sama nekonsekvenceco kuŝas en la uzo de la akuzativo, kiam la objekta predikativo estas antaŭita de "kiel". Ankaŭ tiu nekonsekvenceco forigas la konfuzon kun la subjekta predikativo.

Pri la frazo "Ŝajnas vere stranga, ke..." la P.G. diras ke la adjektiva formo estas preferinda, sed la elmetita argumento ne estas decidiga. Oni do ne povas konsideri eraro la uzon de la adverba formo. Sekve la du frazoj :

Mi opinias utila represi... Ŝajnas vere stranga, ke...

ne estas identaj. En la unua frazo la uzo de la adjektiva finaĵo estas afero de klaro, en la dua ĝi estas afero de preferindeco, mi diru de persona gusto.

(S.A., jul.63)

D.: En "Leteroj de Zamenhof", I-a volumo, p.327, 4-a linio : "Se do...vi opinias necesa, ke mi sendu vian leteron..."

Ĉu ne "necese" ?

II-a volumo, p.91, lastaj linioj : "Se ni volas atingi rezulton, estas evidente necesa, ke...". Ĉu ne "necese" ?

II-a volumo, p.92, 6-a linio : "pri diversaj detaloj, se estos necese, mi respondos al vi iom poste". Kial ĉi tie "necese" (ĝusta laŭ mi) kaj "necesa" en la unuaj du kazoj? II-a volumo, p.176, linio 10-a: "laŭ opinio, estas tre necese, ke la Organiza Komitato prezentu..."

p.189, lastaj linioj : "Se Vi kune kun la Centra Oficejo trovos, ke estas necese, ke mi parolu publike..." "sed estas necese, ke mi evitu ĉiujn nomojn..."

R.: Estas evidente, ke neavertita leganto trovos ĥaosa tiun nekonekvencon uzadon de formo jen adjektiva, jen adverba. La simpla logiko postulus en ĉiuj kazoj la uzon de la adverba formo. Kun la verbo "esti" tiu uzo prezentas nenian maloportunaĵon; la vorto "necese" aperas klare kiel predikativo de propozicia aŭ infinitiva subjekto. Sed, kiam oni uzas alian verbon, atribuan aŭ perceptespriman, la afero komplikigas per tio, ke la adverba formo povas esti dusenceca. La adverbo povas rilati al la objekto de la verbo kiel objekta predikativo aŭ rekte rilati kiel adverbo al tiu verbo mem.

Ekz.: Vi opinias necese, ke mi sendu vian leteron =

- a) Vi opinias ke la sendo de via letero estas necesa.
- b) Vi necese opinias, ke mi sendu vian leteron...

Por forigi la eblecon de la dua senco, oni konservas la adjektivan formon. Oni ĝin konservas ankaŭ kiam la verbo "esti" estas jam akompanata de alia adverbo (via dua ekzemplo) por eviti ke du samspecaj vortoj rilatu sintakse diversmaniere, unu al la verbo kaj alia al la objekto.

(S.A., jan.54)

A D V E R B O J - K O N J U N K C I O J

Ĉ I Francoj ofte eraras en la uzado de la vorteto "ĉi".

En ĵus ricevita letero mi legas jenan frazon :

Tiun jaron ni ne aranĝos gravajn kunvenojn.

Ĉar temas pri la nuna jaro, oni devus skribi : Ĉi tiun jaron ni ne aranĝos gravajn kunvenojn.

Sen la vorteto "ĉi" oni aludas pri alia, aŭ pasinta aŭ venonta jaro.

D A ŭ R E En la nuntempa literaturo, oni ofte renkontas tiun adverbon, sed ne kun tre stabila senco. Ĝia senco po-

vas esti nur : kun daŭro, sen intermito. Ekz.: Ni daŭre laboris dum la tuta nokto.

En renkontitaj frazoj, ĝi ŝajnas havi la sencon de daŭrigo, neĉesigo. Ekz.: "Malgraŭ la pluvo ni daŭre laboris." La enkonduko de tiu dua ŝenco, kiun povas havi nur la adverbo "plu" povas krei konfuzon malgraŭ la najbareco de ambaŭ sencoj. Ĉar la ĉefa kvalito de Esperanto estas la klaro, oni do nete distingu : "Ni daŭre laboris" = Ni laboris sen intermito

"Ni daŭrigis la laboron" aŭ "Ni plu laboris" = Ni ne ĉesigis la laboron.

(E.L., feb.52)

Ĉ U...Ĉ U / A ŭ...A ŭ / J E N...J E N

En siaj "Lingvaj Respondoj" Zamenhof atentigas pri la konfuzo, kiun oni faras inter tiuj vortetoj kaj ankaŭ pri "jen...jen". Tiun lastan duopon oni uzas, kiam la statoj aŭ la agoj, kiujn ĝi prezentas estas sinsekvaj aŭ alternaj. Ekz.:

Li havis strangan sintenon; jen li ridis, jen li ploris.

Per "aŭ...aŭ" oni prezentas alternativon, do elekton el inter du aŭ pluraj statoj aŭ agoj. Ekz.: aŭ morti izole kaj malvarme en disŝiritaj nuboparceloj, aŭ reiri al la tero (Esperanto, aprilo p.67).

Per "ĉu...ĉu" oni ankaŭ esprimas alternativon, sed kun manco de dubo, de necerteco aŭ indiferenteco. El la sama numero de "Esperanto" mi ekstraktas la du versojn :

Ĉu homa, ĉu dia, virino
Eterne nomiĝos obstino.

En "Leteroj de Lanti" mi legas : "El ĉiu ajn infano oni povas fari ĉu kristanon aŭ budaiston ktp, ĉu francan, germanan aŭ japanan patrioton."

Sed nepre korektenda estas la ekzemplo donita en la malnova "Cours Rationnel" p.63 : "Li venos ĉu lunde ĉu marde", kiun oni korektu : "Li venos aŭ lunde aŭ marde".

(S.A., jul.61)

P L I F R U E / A N T A ŭ E

D.: "La turistaj objektoj estis pli frue en privataj manoj, sed nun ili troviĝas plejparte en la posedo de la ŝtato".

Ĉu en tiu ĉi frazo ne estus preferinde uzi "antaŭe" ?

R.: La formo "pli frue" estis ofte uzata de Zamenhof. Ĝi estas germanismo, verŝajne ankaŭ slavismo, ofte kritikata de la Francoj, kiuj preferas, sub influo de sia nacia lingvo, la

formon "antaŭe".

(S.A., okt.54)

L A V E R B O

T R A N S I T I V A / N E T R A N S I T I V A

Konsultu la P.V. !

Multaj lernantoj, eĉ kelkaj progresintoj ne malofte eraras pri la ĝusta uzado de kelkaj verboj. Mi celas tiujn verbojn kiuj prezentas en la naciaj lingvoj duoblan karakteron, rolantajn jen transitive jen netransitive. En esperanto la sama verba radiko ne povas prezenti tiun duoblan vizaĝon; ĝi povas esti nur transitiva aŭ nur netransitiva, laŭ la difino, kiun donas la P.V.

Ekzemple en la franca, la verbo finir signifas jen konduki al fino (transitiva senco), jen alveni al fino (netransitiva senco). En esperanto la verbo fini havas nur la unuan sencon. Por ricevi la duan sencon necesas uzi la sufikson "iĝ", kiu donas al la verbo kvazaŭ pasivan sencon. Ekz.: La kongresanoj finis la debatojn je la kvara.

La debatoj finiĝis je la kvara.

Jen alia ekzemplo : en la franca la verbo brûler signifas jen konsumi per fajro (transitiva senco), jen esti konsumata per fajro (netransitiva senco). En esperanto la verbo bruli havas nur la duan sencon. Por ricevi la unuan sencon oni devas uzi la sufikson "ig". Ekz.: ligno brulas en la forno. La kuiristino bruligas lignon en la forno.

Resume la sufikso "iĝ" netransitivigas transitivan verban radikon, dum la sufikso "ig" transitivigas netransitivian verban radikon.

Jen stariĝas la demando : Kiel rekoni la naturon de ĉiu verbo ? Komparo kun la gepatra lingvo neniel helpas. Nur per praktiko kaj, en okazo de dubo, per konsulto de la P.V. oni samtempe asimilas la leksikologian sencon de la verboj kune kun ilia gramatika karaktero. Bildoj aŭ parkeritaj ekzemploj povas faciligi la memoron. Ekz.: Por ŝveli mi imagas pufvangan knabon, kiu suferas pro dentodoloro, kaj klarigas "liaj vangoj ŝvelas pro dentodoloro". Estas oportune noti sur apartaj slipoj la plej kutime uzatajn verbojn ĝis oni senhezite kaj senerare uzas ilin kun ilia ĝusta propra karaktero.

(S.A., jul.50)

Ekzemplo pri la verbo INDIGNI. Se oni malfermus la P.V., oni legus la jenan difinon de la vorto "indigni" : senti kaj ekmontri koleron kaj malestimon pro maljustaĵo aŭ malnoblaĵo. Pli poste oni rimarkus la formon "indignigi" : kaŭzi, naski indignon. Do la verbo "indigni" estas netransitiva kaj nur per la aldono de la sufikso IG ĝi povas transitiviĝi, kaj alpreni la pasivan formon. Konsekvence oni povas diri "indignigita" sed neniam "indignita", kvankam tiun lastan formon mi rimarkis antaŭ ne longe en artikolo aperinta en serioza esperanta gazeto, eble pro influo de la nacia lingvo de la verkinto.

Alia verbo, kiu, ankaŭ verŝajne pro nacilingva influo, povas akiri en nia lingvo duvizagecon estas la verbo "situi", kiu, kvankam neoficiala vorto estas tre oportuna kaj ofte uzata verbo, precipe sub la participaj formoj. En la P.V. ĝian uzon klarigas la jenaj ekzemploj : bele situanta urbo; nia tendaro situis en valo. Ĝi do rolas netransitive kaj pro tio neniam povas alpreni la pasivan formon. Tamen oni renkontas ne malofte la formon "situita" verŝajne pro identigo al la franca "situé" aŭ al la angla "situated". Tiu formo estu zorge evitita kaj oni uzu la verbon "situi" nur laŭ ĝia senco montrita en la P.V.

Estas neeble formuli ĝeneralan regulon por helpi al la lernanto en la ĝusta sintaksa uzado de la verbaj formoj. Ne ĉiam estas ĝusta la regulo laŭ kiu, ĉiuj verboj senpere formitaj el substantivaj radikoj estas transitivaj. Dum estas transitivaj la jenaj ĉi-subaj verboj :

Formi, heroldi, komplezi, operacii, skizi, signi, skurĝi, strii, sigeli, skandali, signali

Estas netransitivaj la jenaj : Ofici, oratori, orakoli.

Protokoli kaj opozicii povas esti uzataj jen transitive jen netransitive.

Pri la substantivo "ordo", kvankam en la P.V. oni citas ne la formon "ordi" sed la formon "ordigi" por esprimi la ideon "meti ion laŭorde", kelkaj aŭtoroj, i.a. la verkintoj de la P.G. uzas la formon "ordi" pro analogio al la aliaj supre menciitaj formoj. Nenia motivo povas kontraŭstari tiun logikan uzadon.

Resume, kiam oni renkontas novan verbon, oni zorge priatentu ne nur ĝian leksikologian sencon, sed ankaŭ ĝian gramatikan sintenon en la propozicio kaj oni zorge legu la ekzemplojn, kiujn la aŭtoroj de la P.V. elpikis el inter niaj plej aŭtoritaj aŭtoroj kaj precipe el la Zamenhofa verkaro.

Ili havos seriozan bazon sur kiu ili povos firme sin apogi por plua korekta uzado de nia lingvo.

(E.L., feb.48)

D.: En la Gramatika Gvidlibro eldonita de GEE mi legas (p.23): "...ĉar kontraŭe al aliaj lingvoj, unu sama verbo ne povas roli jen transitive jen netransitive". Tamen en P.V. oni trovas verbojn kiel "odori" signitajn(x), do samtempe tr. kaj ntr. Mi ne komprenas.

R.: En la tabelo de la mallongigoj la P.V. donas al la signo (x) la signifon tr. kaj ntr. Tiu signifo estas erariga ĉar en esperanto verbo ne povas havi tiun duoblan sintaksan valoron. Nur la verbo "fumi" estas transitiva en la senco de "ĝui la fumon de" kaj netransitiva en la senco de "eligi fumon". Sed en tiu ĉi ekzemplo temas pri semantika dueco kun nenia rilato kun la sintakso. Ankaŭ la verbo "urĝi" estas transitiva en la senco "instigi al tuja ago" kaj netransitiva en la senco "esti ne prokrastebla". Zamenhof uzas la netransitivon verbon "lumi" en la senco de "prilumi"(tr). Ekz.: Malmultaj lanternoj lumis la mallarĝan strateton (Marta, p.11); Krom laboro, kiu lumas la solecon...(Marta, p.16). Tiu lasta senco ne estas menciita en la P.V. supozeble pro sia arkaikeco.

La verboj signitaj (x) estas en realo netransitivaj verboj, kiujn oni ofte renkontas akompanataj de akuzativa komplemento. Sed tiu akuzativa komplemento ne pravas ilian transitiveton ĉar ĝi povas esti :

a) suplemento de la substantiva aŭ substantivigita radiko de la verbo. Ekz.: Li ĉiam odoris eksterordinarajn parfumojn. (Li eligis odoron de eksterordinaraj parfumoj).

b) suplemento de adjektiva radiko. Ekz.: Tago tagon sekvas sed ne similas (Ne estas simila al tago).

c) adjekto de la koncerna verbo. Ekz.: Li tro fidas siajn fortojn (Pri siaj fortoj).

ĉ) Kiam la komplemento havas efektivan objektan valoron, ĝia objekteco rilatas ne al la koncerna verbo sed al alia subkomprenita ago, kiun diktas la kunteksto, kaj la esprimita verbo agas adverbe al la subkomprenita. Ekz.: La ĉasisto fajfas sian hundon (fajfe vokas sian hundon). Kaj la erarema malkuraĝa homo pro timo mensogas al si Eternan Vivon (J. Baghy) (mensoge imagas al si...).

La distingo, kiun faras la P.V. inter la verboj signitaj per (x) kaj tiuj signitaj per (ntr) ne ĉiam estas konsekvenca.

Ekzemple la verbo "fajfi" signita (x) kaj la verbo "sibli" signita (ntr) havas unu komunan sencon kaj nenio pravigas tiun distingon. Ĉu poeziema lernanto ne povus proponi al mi jenan frazon : "La aŭtuna vento siblis siajn funebrajn kant-ojn ?"

Resume ĉiuj verboj signitaj (x) estas netransitivaj verboj, kia ajn estas la sintaksa valoro de iliaj komplementoj kaj sub kia ajn formo ĉi-lastaj ligiĝas al ili.

(S.A., okt.61)

Insidaj verboj

Mi jam atentigis pri la neceso uzi la esperantajn verbojn laŭ ilia ĝusta senco kaj gramatika karaktero. Oni evitu sin lasi influi de la franclingvaj respondaj formoj. Mi montris kiel ekzemplon, ke la verbo "indigni" estas netransitiva kaj ne povas toleri la pasivan formon "indignita"; oni devas uzi la aktivan participon "indignant" por traduki la francan participon "indigné", kiu samtempe estas aktiva (kiam ĝi estas uzata kiel la participo de la verbo "s'indigner") kaj pasiva (kiam ĝi estas uzata kiel la participo de la transitiva verbo "indigner").

En la tradukekzercoj de kelkaj lernantoj mi trovis la jenan frazon : "ili estis deciditaj regi en ĉi tiu mondo", por traduki la francan frazon : "Ils étaient décidés à régner ici-bas". Laŭ la P.V. decidi estas ja transitiva verbo, sed ĝia objekto povas esti nur nomo de ago sub la infinitiva aŭ substantiva formo. La skemo estas : Iu decidas ion; aŭ en la pasiva formo : "io estas decidata de iu". Niaj amikoj decidis ekskurson, konstruon de domo. La ekskurso estis decidita de niaj amikoj. Do persono neniam povas esti decidita, sed nur decidigita, kiam oni agas al ĝi por ke ĝi decidu.

La erara citita frazo devus do aspekti jene : Ili decidis regi en ĉi tiu mondo. aŭ, se ili estis instigataj de ekstera kaŭzo "Ili estis decidigataj regi en ĉi tiu mondo". Saman eraron mi renkontis ĉe Lanti, kiam li skribas : "Ni devas kuraĝe dishaki por fari lumon kaj forpeli la nigrajn bestojn embuskataj en densejoj". (Vortoj, p.51). Se ne paroli pri la stranga neplena akordigo de la adjektivo "embuskataj", oni rimarkas, ke la verbo "embuski" estante netransitiva same kiel la verbo "indigni", ne toleras la pasivan formon. Oni embuskas por surprize ataki ĉasajon aŭ malamikon. Oni embuskas kontraŭ homoj aŭ bestoj. Nur per pliampleksigo de la transitiva ideo, oni povas konsideri la adjekton kiel objekton kaj diri : embuski homon, beston.

Do nur la ĉasataĵo povas esti embuskata, ne la homo, kiu embuskas. Tiu vorto estas korekte uzata en la jenaj frazoj, kiujn mi elpikis el la bonega traduko de Gösta Berling fare de St. Engholm :

La griza rivero kiu fluas kun multaj briletantaj ondetoj, estas granda serpento, kiu embuskas por kaptiĵo... sur kies fundo embuskas la serpento. Baldaŭ homo venos sur tiun vojon kaj ĵetos sin en la faŭkon de la embuskanta serpento (p. 318-319).

Verŝajne spite al sia ĉiutaga praktiko de la lingvo, Lanti estis influata de la franca esprimo. Tion oni facile komprenas, kiam oni scias ke, en la franca lingvo la t.n. "participes passés" estas jen aktivaj, jen pasivaj. Ekz. : Un homme décidé (aktiva senco), une chose décidée (pasiva senco); un soldat embusqué (soldata slango - pasiva senco), un homme embusqué (aktiva senco); une araignée pendue (aktiva senco), un homme pendu haut et court (pasiva senco). Ne necesas plimultigi la ekzemplojn por montri, ke la imito de la gepatra lingvo ne povas esti solida tereno por la uzado de la respondaj esperantaj verboj. Oni provu pensi logike rekte en esperanto, ne lasante sin influi de la formo, precipe en la uzado de la netransitivaj verboj, kies participoj ne toleras la pasivan formon, krom en la maloftaj okazoj, kiam per pliampleksigo de la transitiva ideo, oni konsideras ilian adjekton kiel veran objekton.

(E.L., jan. 51)

D.: En la revuo "Bulgario" mi legas la frazon : "El la tri plej gravaj branĉoj hodiaŭaj la plej malmulte evoluitan (sic!) kaj sekve plej antikvan tipon prezentas la slava branĉo. Pli evoluintan (sic!) ŝtupon prezentas la latina branĉo"

Kial en la sama frazo oni uzas la du formojn "evoluitan" kaj "evoluintan"? Kiu el la du formoj estas la ĝusta ?

R.: La fakto ke la recenzanto skribis la atentigan signon (sic!) post ĉiu el la du formoj montras ke li mem rimarkis tiun nekonsekvencaĵon en tiu citaĵo kaj ke kulpis ĝin ne li sed la aŭtoro mem.

La verbo "evolui" apartenas al tiu grupo de verboj, kies strikta netransitiveco ne toleras la pasivan formon de iliaj participoj. Ĉar tiuj participoj esprimas difinitan staton rezultantan el la koncernaj agoj, oni ofte konfuzas ilin

kun la participoj de transitivaj verboj esprimantaj la saman ideon per la ita-formoj.

El inter tiuj verboj oni citu jenajn : fermenti, ŝrumpi, putri, situi, pendi, kuŝi, kaj ĉiuj poz-indikajn verbojn. Oni do uzu la participojn "fermentinta, ŝrumpinta, putrinta, situanta, pendanta, kuŝanta, ktp," ekskluzive de la pasivaj formoj. Koncerne la verbon "situi" oni kelkfoje donas al tiu verbo la sencon, kiun ĝi havas en la franca de "loki", kiu estas transitiva kaj permesas la uzon de la pasiva participo "situita". Por eviti tiun duoblan sencon, oni prefere uzu "situi" netransitive, rezervante por la transitiva senco la formon "loki".

(S.A., feb.66)

TEMPOJ

D.: Mi legis jenan frazon : "Mi demandis sinjorinon, ĉu ŝi bedaŭris la lernadon." Ĉu la uzo de is-tempo en la verbo estas korekta ?

R.: Temas pri nereakta demando, en kiu la tempo de la verbo devas esti la sama, kiun oni uzus en la rekta demando. Kiel oni alparolus la sinjorinon ? La rekta demando tekstus jene : "Ĉu vi bedaŭras (ne bedaŭris!) la lernadon ?" La frazo do devas aspekti sub korekta formo : "Mi demandis sinjorinon, ĉu ŝi bedaŭras la lernadon".
(S.A., jan.67)

D.: En la frazo : "Ili ne plu estis rusoj, hispanoj, francoj... sed nur homoj, kiuj havis la saman idealon, la saman lingvon." Kial oni ne skribas : "kiuj havas la saman lingvon". Uzante partecipian epiteton, oni diras : "havantaj la saman lingvon", oni do uzus prezencan partecipon. En la P.G. mi trovis nenion, kio donus al mi respondon al tiu problemo.

R.: En la P.G. oni povas legi (par.399, tempoj absolutaj) :
Absolutaj estas la tempoj:
1° - En ĉiuj subpropozicioj rilataj (subjunkcioj; rilatpronomoj)

Do la citita de vi frazo estas korekta. La preteritoj estis, havis, havas rilaton nur kun la nuno. Nur la kunteksto permesas kompreni, ke ili estas samtempaj. La partecipa konstruo enkondukas tempindikan rilaton inter la du verboj, kiu ne ekzistas en la konstruo per subpropozicia komplemento. Oni do ne povas identigi ambaŭ konstruojn. La prezenca partecipo signas nur la samtempecon de la agoj kaj nenian rilaton kun la nuno. En la

koncerna ekzemplo oni povas egaligi : havis = havantaj.
 N.B. Mi trovis tamen en la libro Homoj kaj Riveroj de J.H. Rosbach (p.84, 1a linio) "... kaj ni rigardis la homojn, kiuj naĝas en la rivero". Tiu konstruo ne estas kutima. Ĝin uzis la aŭtoro supozeble pro aparte stila efekto.
 (S.A., nov.69)

D.: "Se pluvus, ni vizitus la manufakturon de Sèvres". Kial oni uzas la kondicionalon ?

R.: Ĉar temas pri ebla supozo, en tiu ĉi frazo la kondicionalo ne estas ĝusta. Oni diru : "Se pluvos, ni vizitos la manufakturon de Sèvres". En la franca lingvo ambaŭ manieroj estas uzeblaj sen perceptebla nuanco en la signifo. Sed en Esperanto la kondicionalo signifus : "Se pluvus (sed fakte ne pluvos), ni vizitus (do ni ne povos viziti) la manufakturon de Sèvres". Ĉar, en la futuro, ĉiuj eventualaĵoj estas eblaj, la kondicionalo ne estas uzebla. Ankaŭ ĉi tie temas pri imito de franclingva formo.

(S.A., dec.55)

Ata - ita

En la plimulto el la naciaj lingvoj ne ekzistas diferencigo inter la prezenca kaj la preterita pasivaj participoj kaj la strikta apliko de la esperantaj ata kaj ita-formoj ne ĉiam estas konsekvenca, eĉ sub la plumo de bonaj esperantistoj. En du lastaj numeroj de SAT-Amikara bulteno, mi renkontis i.a. la jenajn ekzemplojn :

- ...aŭ fine per akuzativo kaj pasiva formo, kiam ili estas konitaj. (Konsiloj pri la instruado de Esperanto).
- La vivo de nia bulteno estas garantiata.
- Tiam oni fermas la libron kaj la pligrandigita kolora reprodukto de la bildo estos alfiksita al la tabulo.
- Se oni ne posedas tian bildon prefere lasi la libron malfermata.

En tiuj frazoj mi respektive uzus la sekvajn formojn :

- Kiam ili estas konataj. La vivo de nia bulteno estos garantiita. Kolora reprodukto de la bildo estos alfiksata.
 Prefere lasi la libron malfermita.

Kiel oni povas akiri aŭ akirigi al la lernantoj la ĝustan komprenon de tiuj formoj ? Precipe oni ne enŝovu en la klarigojn pritempajn konsiderojn. Ĉi-lastaj intervenas nur por

la ĝusta uzado de la tempaj finaĵoj en la propozicia verbo, plej ofte la verbo "esti". Mi estis (hieràù), mi estas (nun), mi estos (morgàù).

La ata-formoj. Ekz.: La ribelantoj estis atakataj de la faŝistaj trupoj. Dum du tagoj la arestitoj estis mortpafataj sen juĝo.

Oni uzu la ata-formon, kiam oni atentigas pri la ago mem en ĝia disvolvo aŭ en ĝia ripetado, sed nepre ne pri ĝia konkreta rezultato. Do ĉiuj verboj, kies ago ne postlasas rezulton allasas nur la ata-formon de la participo. La ekzemplo "kiam ili estos konitaj" estas erara, ĉar la ago "koni", kiam ĝi ĉesas, ne lasas rezulton. Same estas la verboj : ami, adori, admiri, abomeni, akompani, atendi, esperi, festi, frekventi, viziti, ktp.

La ita-formoj. Ekz.: Prefere lasu vian libron malfermita. La packontrakto estis subskribita de ĉiuj plenrajtigitoj.

Oni uzu la ita-formon, nur kiam oni deziras atentigi pri la konkreta rezulto de la ago. Do tiu formo pli proksimiĝas al la vera adjektivo ol la ata-formo, kiu estas pli proksima al la verbo. Kompreneble nur la verboj, kies agoj postlasas rezulton povas alpreni la ita-formon. En la frazo : "la vivo de nia bulteno estos garantiita" oni uzu la ita-formon, ĉar ne pri la ago mem oni deziras akcenti, sed pri ties rezulto, t.e. la vivo de nia bulteno. En la lasta frazo : "prefere lasi la libron malfermita", oni komprenu, ke la ata-formo estas erara, ĉar oni ne povas lasi ion sub la efiko de nedaŭra ago, kia estas la ago "malfermi". Sed la libro povas resti malfermita, ĉar tiu participo esprimas la rezulton de la ago "malfermi".

(S.A., jan.50)

D.: Mi rimarkas en PIV ĉe la vorto (mal)permesi, ke, ĉe la ekzemploj pri participoj adjektivaj, ĉi tiuj alprenas la finaĵon ATA, dum ĉe la ekzemploj pri participoj adverbaj, ĉi tiuj alprenas la finaĵon ITE. Ĉu ITE (-kaj ne ATE) ĉar la ago (mal)permesi estas jam finita, kaj ATA, ĉar la rezulto de la ago (la (mal)permeso) pludaŭras ? Ĉu tiu klarigo estas bona, aŭ alia ?

R.: La diferenco en la uzado de la ITA kaj ATA, respektive ITE kaj ATE-formoj dependas ne de ilia gramatika naturo sed de la dueco de la senco de la koncerna verba radiko, kiun oni povas observi en grupo de iuj verboj, i.a. (mal)permesi, okupi, k.a.

En siaj LINGVAJ RESPONDOJ Zamenhof tre klare reliefigis tiun duecon koncerne la verbon "okupi". La samon oni povas apliki al la verbo malpermesi, kiu signas jen la agon (dekreto, anonco, publikigo) per kiu oni rifuzas al iu la rajton fari ion, jen la postagan staton, kiu rezultas el tiu dekreto, ktp. Tiu verbo do estas jen momentaga verbo (uzo de la ITA, ITE-formoj), jen postaga stata verbo (uzo de la ATA, ATE-formoj). La nuanco estas ofte tre subtila. Koncerne la verbon OKUPI Zamenhof preferis uzi la ITA-formon, sed en la ekzemploj cititaj en la PIV multaj rilatas al la ATA-formo. Oni memoru ke "kio estas permesata al Jupitero ne estas permesata al bovo" (la originalago ne ekzistas), sed mi povas legi sur apudrivera tabulo "Fiŝkaptado malpermesita", ĉar oni atentigas pri la dekreto mem, kiu evidente estigas la postagan staton, kies daŭron ne necesiĝas akcenti. Tamen se per preciziga adjekto oni deziras limigi tiun staton, povas praviĝi la ata-formo. "La fiŝkaptado estas malpermesata de la unua de aprilo ĝis la unua de julio".

(S.A., feb.73)

D.: "La bankoj estas fermataj de vendrede la 15a horo ĝis lunde 9,30 h..." Ĉu la participo "fermataj" estas korekte uzata ?

R.: La ata-participoj elvokas la agon en ties plenumiĝo. En la koncerna frazo tiu plenumiĝo daŭras de vendredo 15 h ĝis lundo 9,30 h, t.e. longan tempon por ago, kiu kutime estas tre mallongdaŭra. Oni do ĝin prezentas al si kiel ripetatan por ke ĝi okupu la tutan esprimitan tempon. Ŝajnas ke tuta armeo da servistoj estas okupataj en la fermado (kaj konsekvence en la malfermado) de la bankoj dum la tuta semajnfino. Kompreneble ne tion oni intencis esprimi, sed nur la postagan staton de la bankoj, kiun oni korekte esprimu per la ita-formo "fermitaj".

(S.A., nov.67)

D.: Mi legas : "La bankroto estis deklarata la 12-an de januaro 1920". Ĉu la uzo de deklarATA en tiu ĉi frazo estas korekta ?

R.: Ĉu necesas revigligi la lukton, kiu oponas la fundamentistojn (la t.n. aspektulojn) kaj la simetriulojn ? Sufiĉas diri, ke la ATA-participo emfazas la malvolviĝon de la ago, senkonsidere pri ties rezulto. Kp. en la Ekzercaro la frazon : "Ĝi (la fervojo) estis konstruATA pli ol tri jarojn". Tiu daŭro de la ago estas tiom pli eksplicite formulata, ke

la partecipo estas sekvata de tempadjektita komplemento, kiu su-
pozeble esprimas la daŭron de la ago.

En la koncerna frazo oni povus supozi, ke la deklaro daŭris
la tutan tagon, sen ke estas esprimita la tempo, kiam ĝi atin-
gis la finan deklari-tecon.

La ĝusta formo estus : "La bankroto estis deklarita la 12-an
de januaro 1920".

(S.A., feb.64)

a/anta

D.: "Dejora klaĉisto". Kial ne "dejoranta" ? Kia diferenco in-
ter tiuj du vortoj ? Same pri skriba kaj skribanta, ktp.

R.: La finaĵo "a" post verba radiko montras, ke la akompananta
substantivo havas ian rilaton kun la ago esprimita de tiu ra-
diko. Tiu rilato estas plej diversa :

1^o Rilato de ago al aganto. Al tiu kategorio apartenas "dejora
klaĉisto", kies senco estas tiu sama, kiun havas la responda
aktiva partecipo "dejoranta klaĉisto".

2^o Rilato de ago al la suferanto de la ago (nur kiam la verba
radiko estas transitiva). Ekz.: ĉagrena koro = ĉagrenita koro
Skriba ekzameno = skribita ekzameno.

3^o Rilato de ago al adjekteca substantivo (tempa, loka, mani-
era rilatoj). Ekz.:

Jam eksonoris la dejora horo (tempopunkta rilato).

Ni estis liberaj ĝis nia dejora semajno (tempodaŭra rilato).

Oni disponigis al ni ripozan ĉambron (loka rilato).

Li preterpasis nian grupon kun evit(em)a rigardo (maniera rila-
to).

La simpla a-finaĵo do havas pli larĝan senco-ol la partecipaj
finaĵoj. Tiun senco-precizigas la koncerna substantivo. En
"skriba maŝino", skriba = skribanta; en skriba kurso, skriba =
skribita.

En okazo de dubo oni uzu la plenajn partecipajn formojn en la
kategorioj 1 kaj 2, kaj substantivan suplementon en la katego-
rio 3.

(S.A., jul.60)

I N F I N I T I V O post prepozicioj

D.: "...krom direkti per tiuj rezolucioj la tutan agadon sur la
lerneja kampo"... "la mastro krom posedi la riĉaĵojn, kreis mo-
ralon por sia profito". Ĉu tiu uzado de la prepozicio KROM an-
taŭ infinitivo estas korekta ?

R.: Laŭ la opinio de Zamenhof (Vd. la Lingvaj Respondojn) la solaj prepozicioj uzeblaj antaŭ infinitivo estas POR kaj ANSTATAŬ. Post la aliaj prepozicioj estas ĉiam eble doni al la ag-esprima vorto la formon de substantivo. Malgraŭ tiu konsilo la nuna evoluo de la lingvo tendencas al la uzo de aliaj prepozicioj antaŭ infinitivo, i.a. de la prepozicio SEN. Oni konsciu, ke tiu uzo rompas la simetrieton inter la klasikaj frazoj :

Afirmativa formo : Li mortis sciante la kulpecon de sia filo.

Nea formo: Li mortis ne sciante la kulpecon de sia filo. Se eblas uzi la prepozicion SEN en la nea senco (sen scii), estas neeble uzi la prepozicion KUN en la afirmativa senco. Malgraŭ tiu rompo en la simetrio, oni ne povas entute forĵeti la uzon de infinitiva formo post prepozicio, ĉar ne estas ĉiam eble doni al tiu infinitivo la substantivan formon kaj krome la infinitiva konstruo ofte evitas pezajn formojn precipe kiam la ag-espriman vorton akompanas objektaj kaj adjektaj komplementaj.

(S.A., jan.64)

D.: "Kiu post vidi tiun filmon ankoraŭ opinios...". Neniam mi trovis post uzata antaŭ verbo. Ĉu tiu uzo estas rekomendinda aŭ eĉ korekta ?

R.: Pro la duobla naturo de la infinitivo, jen substantiva, jen pure verba, oni ne povas diri, ke la uzo de prepozicio antaŭ infinitivo estas mallogika, sed en la nuna lingvuzo ĝi estas ankoraŭ nekutima kaj, se oni obeas la instruon de Zamenhof (Vd. "Lingvaj Respondoj"), ĝi estas tute nekonsilinda. La kutima korekta formo estus : "Kiu, vidinte tiun filmon, ankoraŭ opinios...". Kiam infinitivo havas substantivan valoron, kial oni ne donus al ĝi la substantivan karakterizan finaĵon "o" ? Ekz.: "Kiu, post la vido de tiu filmo, ankoraŭ opinios..."

Esperanto posedas sufiĉajn esprimrimedojn, ke ne necesas ĉerpi el la logiko formojn, kiuj povas aspekti strangaj pro sia nekutimeco.

(S.A., feb.68)

A D V E R B A J P A R T I C I P O J

Kvankam pri tiu temo oni jam multe diskutis, ŝajnas al mi utile resumi por la novaj lernantoj, la rezulton de tiuj diskutoj por ke ili havu klaran komprenon pri tiu speciala

punkto de nia gramatiko.

Tipaj frazoj : Promenante sur la strato, mi falis.

Forlasite de ĉiuj, ŝi dronis en malespero.

Ĝenerala regulo. Oni uzas la adverbajn participojn kiel adjekton de ĉefpropozicia verbo por montri la tempon, la manieron, la kaŭzon, unuvorte cirkonstancon de la ago esprimata de tiu verbo. Oni atentu, ke la subjektoj de ambaŭ ag-vortoj, participo kaj predikata verbo, estu la samaj. Se ili ne identas, oni nepre uzu apartan adjektan subpropozicion por esprimi la cirkonstancon.

Ekz.: Dum mi promenis sur la strato, mia pluvombrelo falis. Se la participo ne esprimas cirkonstancon de la ago, sed estas nur epiteto de la subjekto, oni uzu la adjektivan formon. Ekz.: La koboldo sidis prilumita de la brulanta kontraŭa domo.

Krom tiu uzo de la adverbaj participoj, oni ankaŭ renkontas ilin: ĉe la senpersonaj predikataj verboj, kiuj, ne havante substantivan subjekton, postulas la neŭtran formon de la participo.

Ekz.: Estis pluvinte dum la tuta tago.

Estas ja konate, ke li ĉiam mensogas.

Oni kelkfoje trovas ilin en frazoj, en kiuj ili rolas kiel simplaj adverboj, t.e. kun rilato nur al la ago, sed ne al ties subjekto. Ĉe Zamenhof oni trovas tiun ĉi frazon: "tenante ambaŭ manojn forte alpremite al sia ruĝa ĉapo". Tiu uzado estas nekonsilinda, ĉar erariga, malgraŭ la klarigoj, kiujn oni iam provis doni en la kolonoj de "Nia Gazeto" (marto 1937). Same nekonsilindaj estas la frazoj:

Mi sendas al vi la pakajon afrankite.

Vi trovos la fotojn ĉi enfermite.

Adverba participo ne povas entute identiĝi kun simpla adverbo, ĉar la participa finaĵo, aktiva aŭ pasiva, neprigas ke iu aŭ io faris aŭ suferis la agon, do pensigas al gramatika subjekto, dum la simpla adverbo, eĉ derivita el verba radiko ne elvokas tiun akcesoran ideon.

En la supraj ekzemploj oni uzu aŭ la adjektivajn formojn aŭ la simplajn adverbojn.

Tenante ambaŭ manojn forte alpremitaj al sia ruĝa ĉapo.

Mi sendas al vi la pakajon afranke.

Vi trovos la fotojn ĉi-enferme.

Malgraŭ la aserto de la aŭtoro de la ĉi-supre aludita artikolo, la simplaj verbradikaj adverboj ne speciale prezentas aktivan sencion, ankaŭ ne pasivan. Nur la kunteksto povas atribui al

ili jen ĉi tiun jen tiun alian sencon. Cetere tiu sencdistingo estas plej ofte senutila.

(E.L., apr.51)

D.: En la frazoj :

- a) Stangpuŝate de la knabinoj, la pramo senŝanceliĝe glitis al la mezo de la rivero...
- b) Elektite kiel popola reprezentanto en la jaro 1953, li ofte diris...
- c) Facila lernolibro de anatomio kaj fiziologio de la homo por laikuloj, kun 34 figuroj, skribita en agrabla, klara lingvo...

Kial oni uzas la adverbajn finaĵojn en la ekzemploj a kaj b, kaj la adjektivan finaĵojn en la ekzemplo c ?

R.: En la unuaj du frazoj la participoj rilatas al la propozicia verbo kiel adjektoj kaŭzaj, tempaj, ktp; ili oportune anstataŭas kaŭzajn, tempajn subpropoziciojn.

- a) la pramo glitis tial, ĉar ĝi estis puŝata de la du knabinoj.
- b) Post kiam li estis elektita kiel popola reprezentanto, li ofte diris...

En la ekzemplo c) la participo rolas kiel simpla epiteto de la substantivo "lernolibro" sen rilato al iu ajn ag-esprima vorto.

Oni atentu, ke en la adverba formo la participo havas la saman subjekton kiel la propozicia verbo. Ĝi ne povas rilati al alia substantivo. Frazoj kiel "Mi sendis al vi la pakajojn afrankite" estas nepre malkorektaj, ĉar "afrankite" rilatas ne al mi, sed al la pakajo. Oni diru : "Mi sendis al vi la pakajojn afrankita."

Komparu la frazojn :

Mi fotis la sinjorinon starante (mi mem staris dum la fotado).

Mi fotis la sinjorinon staranta (la sinjorinon mi fotis en stara pozo).

Mi fotis la sinjorinon starantan (El grupo de diverse poziciantaj sinjorinoj, mi fotis tiun, kiu staris).

(S.A., aŭg. 62)

DE / FARE DE

D.: "...farmisto Stephen S.Sibanda estis...forkondukata de la edzino kaj kvar infanoj..." Tiu frazo estas dusenca.

Oni povas kompreni, ke lin forkondukis la edzino kaj la kvar infanoj, dum tute ne temas pri tio. Kiel kompreni tiun ĝenan dusencecon ?

R.: Pro la diversaj sencoj de la prepozicio DE, oni estu singarda en ĝia uzado post pasiva participo, en kiu kazo sin trudas al la spirito ĝia enkonduko al aganta adjekto. Se oni celas enkondukon al alinatura adjekto, tuj estiĝas konfuzo kaj dubesenceco. Oni tiam ŝanĝu la konstruon de la frazo. La ĉi-supran frazon oni konstruu jene : "S. Sibanda estis...kondukata for de siaj edzino kaj kvar infanoj al tia kaptitejo".

En la kazoj kiam necesas neprigi la enkondukon de aganta adjekto, oni uzu la prepoziciaĵon FARE DE aŭ eĉ la simplan radikalon FAR. Ekz. : Tiam okazis la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro.

(S.A., okt.70)

PREPOZICIOJ

A N T A ŭ

D.: ...mi kelkfoje trovas malfacilaĵon por esprimi ideon eĉ simplan : ekz. pri la uzado de "antaŭ" por estonta tempo. Mi opinias, ke tiu uzo estas korekta nur se ni montras fiksitajn tempon (horo aŭ dato), sed mi ne ŝatas : "eksperimento ne okazos antaŭ kvin jaroj", kvankam Fruictier skribas : "Kelkaj aŭtoroj uzas antaŭ en estonta signifo : 'vi devas pagi vian ŝuldon antaŭ tri tagoj'; en tia okazo oni povas uzi "en" aŭ "ĝis" (p.140, P.G.)

Ĉar niaj lernolibroj instruas ke "antaŭ tri tagoj = il y a 3 jours", ŝajnas al mi, ke ni devas kondamni la ekzemplojn de Fruictier.

R.: Diri ke tiu esprimo havas la signifon de "il y a cinq ans" kiel estas instruite en la lernolibroj por franclingvuoj ne pravigas ĝian uzrajton kun unusola signifo, ĉar la lernolibroj devas instrui la lingvajn elementojn en la limo de la korekteco, tia kia ĝi estas akceptita de la ĝenerala uzado kaj ne estrece submeti ilin al siaj arbitrecaj instruoj.

La formo "antaŭ kvin jaroj" estas same mallogika ĉu ĝi rilatas al la pasinteco, ĉu al la futuro. En la pasinteco la prepozicio antaŭ rilatas ne al la daŭresprimo "kvin jaroj" sed al la nuno. Ĝi signifas "kvin jaroj antaŭ la nuno". Tute male en la futuro

ĝi rilatas ne al la daŭresprimo sed al ties fino; ĝi do signifas : "en la daŭro de kvin jaroj, kies fino situas kvin jaroj post la nuno". Estas neniam rilato inter ambaŭ kazoj kaj estus vane pravigi ilian uzadon per adekvata rezonado. Nur la lingvouzo povas decidi. Ĝi fakte decidis, ke tiu formo estas korekta en la pasinteco, sed ankoraŭ ne decidis pri la uzo en la futuro. Paroli pri nekorekteco estas arbitreca dekreto; oni minimume diru, ke ĝi estas nekutima kaj nekonsilinda pro sia neklaro kaj konfuzigo.

Jen kelkaj formoj, kiuj povas anstataŭi la nedezirindulon:

eksperimento ne okazos en la venontaj kvin jaroj.

vi devas pagi vian ŝuldon en la proksimaj tri tagoj.

Kaj se oni deziras emfazi la neprecon de la datlimo :

Vi devas pagi vian ŝuldon ne pli malfrue ol post tri tagoj. (malgraŭ la pezeco de tiu lasta formo).

La uzo de la prepozicio ĝis estas ebla nur se la tempolimo estas difinita per dato aŭ alia precizigilo.

(S.A., dec.73)

D. : "li foriris, antaŭ ol la triumfo de Esperanto". Mi opinias, ke tie ĉi "ol" estas nebezona.

R. : Tiu uzo de subjunkcio anstataŭ simpla prepozicio pravigas per tio, ke la prepozicio post la verbo "foriri" havus lokan sencon : "li foriris fronte de la triumfo de Esperanto", dum oni intencas neprigi la tempan sencon, kio necesigas la uzon de tempa subjunkcio. Pli bona solvo estus diri : "Li foriris antaŭ ol triumfis Esperanto" aŭ "Li ne ĝisatendis la triumfon de Esperanto".

(S.A., jun.60)

D E / D A

D. : Mi legis jenan frazon : "Nuntempe unu kvarononda salajro oni pagas al mi". Ĉu en tiu frazo la prepozicio da estas korekte uzata ?

R. : La prepozicion da oni uzas post vorto, kiu indikas kvanton aŭ mezuron. La demando estas "kiom da...?" En la koncerna frazo oni ne povas demandi "kiom da salajro?" sed "kiun parton de la salajro?" Oni devus diri "unu kvaronon de salajro".

Oni uzas tiun prepozicion ankaŭ post vortoj, kiuj ordinare ne signas kvanton aŭ mezuron, sed kiuj en apartaj kazoj povas tion esprimi metafore. Ekz. : Oni ne devas forĵeti

sen seriozaj pruvoj la rezultatojn de jaroj da paciencaj tra-serĉoj". En tiu ĉi frazo la vorto "jaro" esprimas tempan kvanton kaj pravigas la uzon de da. Same en la frazo : "Legioj da muŝoj svarmis ĉirkaŭ la tablo", en kiu "legio" esprimas grandan nombron.

(S.A., mar.53)

P O

D.: Mi legas en la P.G. : "Ĉar PO estas io fremda al la kutimoj de la Okcident-Eŭropaj lingvoj, ties uzado fariĝis pli kaj pli malofta en la lingvo" ; ĉu tiu aserto estas ĝusta ?

R.: Oni respondu jese al tiu ĉi demando, sed kun la jena aldono : "...Krom en la okazoj, kiam ĝi uzurpas la rolon de aliaj prepozicioj". Same kiel kanceraj ĉeloj forpuŝas la sanajn, tiel PO iom post iom invadis en la nuna gazetara literaturo la kampojn de aliaj prepozicioj, supozeble sub la influo de tiuj samaj Okcident-Eŭropaj lingvoj, kiuj devus ĝin likvidi.

Ni komparu la frazojn :

La kuracisto receptis la medikamentojn po dudek gutoj antaŭ ĉiu manĝo.

La laboristo ricevas tricent frankojn pomonate.

La lumo trairas tricent mil kilometrojn posekunde.

La unua frazo estas tute korekta : la medikamento estas dividita en egalaj partoj, el kiuj ĉiu egalas dudek gutojn.

Sed kio pri la du aliaj ? Ĉu la monata salajro estas dividita en egalaj partoj, el kiuj ĉiu egalas unu monaton ? Ĉu la traŭrata distanco estas dividita en egalaj partoj, el kiuj ĉiu egalas unu sekundon ? Absurda, ĉu ne ? La ĝusta prepozicio estas en ambaŭ kazoj : en ĉiu monato; ...en ĉiu sekundo.

La kaŭzo de tiu konfuzo estas verŝajne, ke en la franca lingvo la sama prepozicio estas uzata en ambaŭ kazoj.

En la du lastaj frazoj la distribuata kvanto estas ne la tempo respektive la tuta salajro kaj la tuta traŭrata distanco. Se oni nepre deziras uzi PO, oni diru : ...po tricent frankoj en la monato; ...po tricent mil kilometroj en sekundo. Sed tiu precizigo estas praktike neutila.

(S.A., jun.63)

DE POST / EKDE

Se oni serĉas en la P.V. la sencon de la prepozicio DE, oni rimarkas, ke tuta pago ne sufiĉas por ekspliki kaj klarigi ĝiajn dek unu diversajn sencojn. Por eviti, en kelkaj kazoj, eblan

dusencecon, Zamenhof uzis la duoblan prepozicion DE POST kaj Grabowski iniciatis EKDE. La konsisto de tiuj ambaŭ formoj sufiĉe klare indikas ilian sencon. Malgraŭ tiu klaro - verŝajne influe de naciaj formoj oni ne malofte trovas tiajn formojn, kiaj "depost kelkaj jaroj", "depost dek jaroj" (Vd. la P.V. ĉe la vorto JAM por klarigi la Zamenhofan formon "Jam dek jarojn li loĝas tie ĉi"). Logike tiuj formoj estas ne nur malĝustaj, kiel ilin taksas la P.G., sed nekompreneblaj. Ilia responda logika formo estus "de antaŭ kelkaj jaroj", "de antaŭ dek jaroj". DE POST povas rilati nur al komplemento esprimanta pasintan tempopunkton aŭ pasintan tempodaŭron, sed ne tempodaŭron, kiu finiĝas en la nuno, ĉar post tiu tempodaŭro povas esti nur futuro, kio igas la esprimon absurda.

Ekz.: DE post la unua de januaro mi ne plu ricevas la gazeton.

DE post la lasta milito, la mondo ankoraŭ ne retrovis sian ekvilibron.

En tiu lasta kazo, se oni konsideras ne la finon de la tempodaŭro, sed ĝian komencon, oni uzu EKDE :

Ekde la reĝeco de Ludoviko la dek kvara...
signifas de post la jaro 1643.

De post la reĝeco de Ludoviko la dek kvara...
signifas de post la jaro 1715.

Kiam temas pri tempopunkto, la senco de ambaŭ esprimoj estas identa; nur nuanceto povas ilin diferencigi:

Ekde (de post) mia malsaniĝo mi perdis la apetiton.

EKDE signas la tujan okazigon dum DE POST indikas pli malpli rapide efektiviĝantan konsekvencon.

Interese estas noti, ke mi vane serĉis ekzemplon, per kiu Zamenhof pravigus la uzon de la supre kritikitaj formoj. Aŭ li uzas la simplan DE, aŭ li uzas la vorton JAM kun la akuzativo. Ekz.: DE eterne. Mi jam tridek jarojn estas tombisto (Hamlet). La neceso de lingvo sennacia neŭtrale homa, neniu povas senti tiel forte kiel hebreo, kiu estas devigata preĝi al Dio en jam longe mortinta lingvo...

Oni do limigu la uzadon de DE POST al tiuj kazoj, en kiuj ĝi estas logike komprenebla. En la aliaj kazoj oni uzu la simplan DE aŭ, se oni ne domaĝas la pezecon de la formo, preferu estas uzi la analizan formon "de antaŭ" ol la malĝustan "de post".

D.: "Ĉiuj farmoj kamparaj estis rekonstruitaj depost dudeko da jaroj". Tiu frazo ŝajnas al mi stranga en Esperanto.

R.: Via impreso estas pravigita pro la nekonsekvencaĵoj, kiujn ĝi entenas. Unuflanke la participo "rekonstruitaj" montras, ke temas pri finrezulto de pasinta ago; aliflanke la koncerna tempadjekto signas tempodaŭron en kiu okazis la ago, kio postulus ata-participon. Krome tiu tempodaŭro estas enkondukita per la prepozicio DEPOST, kiun oni povas uzi logike nur por enkonduki tempodaŭron plene pasintan, sed ne finiĝantan en la nuno. Tiu frazo malkaŝas sian francan originon kaj devus teksti jene: "Ĉiuj farmoj kamparaj estis rekonstruataj en la daŭro de la lastaj dudek jaroj".

(S.A., jan.59)

D.: "Depost pluraj jaroj la kooperativisma asocio "Comité des Loisirs" akceptas Esperanton...". Ĉu en tiu frazo la uzo de DEPOST estas ĝusta?

R.: DEPOST, kiun oni prefere skribu DE POST per du vortoj, estas duobla prepozicio en kiu ĉiu el la konsistantoj konservas sian propran senceon. DE signas la punkton de la tempo kie komenciĝas ago aŭ stato (Vd. PIV, senco 2). POST precizigas, ke la enkondukata komplemento rilatas al tempo kiu sekvas la originan tempopunkton signitan per DE. Ne ĉiam ĝi utilas kaj en la praktiko oni ofte ĝin ellasas, ĉar deirpunkton nature sekvas posta ago aŭ stato.

En la koncerna ekzemplo la tempodaŭro "pluraj jaroj" finiĝas en la nuno kaj post la nuno ekzistas neeviteble futuro. Tiam la frazo perdas ĉian signifon. La eraro devenas de la mistrafa identigo de DEPOST kun la franca DEPUIS, kiu identigo ne ĉiam estas ebla. (Atentu pri la falsaj amikoj!). La deirpunkton oni povas signi per "antaŭ pluraj jaroj". Se oni trovas tiun esprimon tro preciza kaj peza, oni diru "dum la lastaj pluraj jaroj".

(S.A., jun.72)

 * L A F R A Z O *

ĈU EBLAS KOREKTE UZI "SIA" ?

Unu el la malfacilaĵoj, kiujn renkontas la komencanto en sia lernado kaj ankaŭ la instruanto en sia instruado de Esperanto estas la ĝusta apliko de la regulo pri la uzado de la refleksiva adjektivo SIA. Fakte tiu regulo estas klara kaj simpla : Oni uzu SIA kiam la determinata substantivo rilatas al la subjekto de la propozicio. Ekz.:

Marta haltis momenton apud la pordo kaj ĵetis SIAN rigardon sur la vizaĝon kaj la figuron de la virino (Marta, p.22)

Kiel korolarion oni povas aldoni, ke oni neniam ĝin uzu, kiam la determinato estas la subjekto mem, ĉu en parte ĉu entute. Ekz.: La bieno de ŝia patro (...) konsistis el kelke da centoj da hektaroj da semtaŭga tero (Marta, p.14).

La ĉefa obstaklo en la apliko de tiu ĝenerala regulo fontas en la erariga influo de la nacia lingvo (la franca) kiu, ne konante la uzadon de la refleksivo, instigas la lernanton uzi "sia" iom hazarde, ŝajne pro la komuneco de la konsonanto S en la posesivoj "sia, son, sa, ses". Ofte daŭras longa tempo, ĝis lia lingva sento konsciigas lin pri la ĝusta uzado de la refleksivo. Nur konstanta praktiko povas helpi.

La alia obstaklo kuŝas en la gramatika karaktero de la determinato. Interne de la propozicio mem, kie regas kaj regas la ĉefpredikata verbo, povas ekzisti aliaj vortoj, kiuj gramatike ne estas verboj, sed tamen esprimas agojn kaj iarilate akiris la prerogativojn de la verbo. Ili povas esti:

- a) substantivoj derivitaj el verbaj radikoj (amo, admiro, fido, konstruo...)
- b) participoj kun respektive substantiva, adjektiva aŭ adverba finaĵo (helpanto, uzata, skribante)
- c) infinitivoj predikataj (Mi vidis lin manĝi)
- ĉ) adjektivoj kun predikata funkcio (Li tute sola ne povus sukcesi en tiu entrepreno).

Tiu duvizaĝeco de tiuj vortoj, kiu similigas ilin al la vesperto de la fablo, kreas kelkajn problemojn, kiujn ni ĉi-poste pristudos. Por ekzempli unu el ili mi proponas al

la legantoj cerbumi pri la jena frazo :

Paŭlo helpis Petron en la konstruado de SIA domo.

Pri kies domo temas ?

...Por la forta ag-esprimeco de la vorto "konstruado", la spirito malkomponas la frazon en du partojn :

1° Petro konstruis sian domon;

2° Paŭlo helpis lin.

Laŭ tiu ĉi kompreno, temas pri la domo de Petro.

Sed, post pli pedanta pripenso - se la kunteksto helpas al tiu kompreno - oni povas imagi, ke Petro, eble masonisto, konstruis la domon ne por si, sed komisie de Paŭlo kaj ke ĉi lasta helpis lin kiel helpmasonisto. Tiam la frazo konsistigas nur unu blokon kaj la domo apartenas al Paŭlo. Por eviti tiun dusencecon, oni devus konstrui la frazon alie. Mi lasas al la legantoj la taskon trovi taŭgan solvon.

"La lingvo servas al la homo, diris germana filologo, por esprimi SIAJN pensojn, sed ankaŭ kaj precipe por esprimi SIN mem" (Eseoj, p.76):

En tiu ĉi frazo la infinitivo "esprimi" havas propran subjekton, kiu ne estas la sama kiel tiu de la ĉefverbo. (...por ke li - la homo - esprimu siajn pensojn). Oni do rilatigu la refleksivon ne al la ĉefverba subjekto, sed al tiu de la infinitivo.

"La birdo flugas ĉirkaŭ ni, rapide kiel la lumo, admirinda pro siaj koloroj, belega en sia kantado." (Fabeloj de Andersen, III, p.12).

La frazpartoj "admirinda pro siaj koloroj", kaj "belega en sia kantado" ne estas konsiderataj kiel epitetoj de la subjekto, kio malhelpus la uzon de la refleksiivo, sed kiel predikativaj.

"Ĉio tio kontribuas al la bunteco de la vivo farante dekoracian kadron por la solida realo de la Angloj en SIA Anglujo".

La korespondanto, kiu sendis al mi tiun ĉi frazon, korektige proponas "en ILIA Anglujo". Li probable forgesis la Zamenhofan frazon : "Ŝi rimarkis la reĝon de la maro kun SIA krono", en kiu la esprimo "sia krono" prezentas nepran emblemon de la reĝeco. Same en la supra frazo oni volas emfazi la striktan ligitcon de la Angloj kun la lando, en kiu ili vivas. Oni povas diri ke "la Angloj en sia Anglujo" konsistigas nedisigeblan tuton, kiu disfalus kaj perdis sian sukcon se oni uzus "ilia".

(S.A., feb., mar., majo 60)

P R I L A R E F L E K S I V O

Mi legas en "Leteroj de Zamenhof" (I, p.304) : "Memoru ĉiam, ke Esperanto devas sin alkonformigi ne al la gustoj de ĝiaj flankaj rigardantoj, sed al la oportuneco de ĝiaj efektivaj uzantoj".

Iuj povus miri kaj sin demandi, kial Zamenhof ne uzis en tiu frazo la refleksivon "siaj" anstataŭ "ĝiaj", ĉar efektive la determinatoj de tiuj posesivoj "rigardantoj, uzantoj" rilatas al la subjekto "Esperanto".

Tion klarigas du kaŭzoj, kiujn ni siavice ekzamenos :

1^o La substantiv-participoj uzantoj kaj rigardantoj prezentas duoblan gramatikan karakteron : substantivan kaj verban. Se ili estus puraj substantivoj, oni devus nepre uzi la refleksivon "siaj", kiu signifus : apartenanta al Esperanto, do la rigardantoj kaj la uzantoj de Esperanto, kiel oni diras "la hundo de la patro". Sed antaŭ substantiv-participo la posesivo povas ludi alian rolon kaj signi la objekton de la ago esprimita de la verba radiko. La rigardantoj de Esperanto : tiuj, kiuj rigardas Esperanton = tiuj, kiuj rigardas ĝin (ne sin!), do ĝiaj rigardantoj.

En la P.G. oni konkludas ke, antaŭ substantiv-participoj, oni neniam uzu la refleksivan posesivon (nur en la okazo, kiam la subjekto kaj la objekto de la verbo estas identaj). Tiu regulo estas nekompleta, ĉar ne en ĉiuj okazoj la verba valoro de la participo estas priatentata. Ĉe multaj substantiv-participoj, la substantiveco superas la verbecon kaj la senco de la posesivo estas la sama kiel antaŭ pura substantivo; ĝi signas la suplementon (genitivon) kaj ne la objekton (akuzativon).

Ni komparu la jenajn frazojn :

La profesoro indulgas siajn lernantojn;

Esperanton indulgas ĝiajn lernantojn.

Estas evidente, ke en la unua frazo la substantiv-participo havas nenian verban valoron (ekzistas lernantoj, kiuj nenion lernas), dum en la dua frazo tiu verba valoro superas la substantivan kaj la posesivo rolas kiel objekto.

2^o Zamenhof neniam uzas la refleksivon, kiam la determinato estas tro malproksima de la subjekto, ekzemple antaŭ suplemento de substantivo, kiu mem estas objekto aŭ adjekto de la verbo.

Mi legas en la sama libro (p.300) : "Kelkaj el la proponantoj estas eĉ tiel senpaciencaj ke ili, forgesante la tutan danĝercon de ilia paŝo, volis jam enkonduki reformojn kaj batali por ili".

Ĉi tie "paŝo" estas pura substantivo kaj por pravigi la uzon de "ilia" anstataŭ "sia", oni ne povas elvoki la unuan kaŭzon. En la praktiko, estas malfacile sekvi la Zamenhofan uzadon, kiu celas al forlaso de la refleksivo en kazoj, kiam ĝi ne estas nepre necesa por eviti dubasencecon, ĉar la limo kiu difinas tiun dubasencecon estas tre moviĝema. La plej bona estas sekvi nian lingvan senton kaj entute ne konsideri kiel eraron la uzon de la refleksivo en la ĉi-supraj ekzemploj. Esperanto indulgu ĝiajn (aŭ siajn) lernantojn !

(E.L., okt. 51)

Mi elpikas tiun frazon : "Jes, li ĝojegus konstati, ke sia fama alvoko 'Proletoj el Ĉiuj landoj unuiĝu!' ne restis vana".

En tiu ĉi frazo kuŝas grava misuzo de la refleksivo SIA. Ĉar la refleksivo ĉiam resendas al la subjekto de la propozicia verbo (aŭ al la plej proksima ag-esprimanta vorto), ĝi neniam povas esti mem subjekto aŭ determini tiun subjekton. La ĝusta formo estus : Li ĝojegus konstati, ke lia fama alvoko ne restis vana. Efektive, "lia fama alvoko" estas la subjekto de la propozicio.

Kompreneble neniam venus en ies kapon uzi la refleksivon SI kiel subjekton; sed pri SIA la konfuzo estas facila, precipe por franclingvanoj pro la komuneco de la S-sono en SIA kaj en la respondaj francaj formoj SON, SA, SES. Tamen en la komenco de frazo, tiu misuzo estas facile evitebla, ĉar tie nur malofte lokiĝas komplemento aŭ predikativo; sed en la mezo de la frazo oni devas zorge atenti ĉu la determinato de la posesivo estas aŭ ne estas la propozicia subjekto.

(S.A., feb.50)

D.: En la frazo : Paŭlo vidis Petron en (...) ĝardeno, se mi volas esprimi, ke Petro estas la posedanto de la ĝardeno, ĉu mi povas uzi SIA ? En la Fundamenta Krestomatio mi renkontis la frazon : "Ĉi rimarkis en granda malproksimeco la maljunan avinon kaj la reĝon de la maro kun SIA krono sur la kapo". Ĉu ambaŭ frazoj ne kompreniĝas per la intermeto de "kiu estas" respektive "kiu havas" ?

R.: Nepre ne. Ambaŭ frazoj ne estas identaj. En la dua frazo la esprimi "reĝon kun sia krono sur la kapo" konsistigas nedis-

erigeblan blokon, ĉar krono estas (almenaŭ en la fabelo), nepre apartenaĵo de la reĝoj. Intermeti "kiu havis" por pravigi la uzon de SIA estas forviŝi tiun elvokivan bildon kaj estas neniel pravigebla. En la unua frazo tiu bloko ne ekzistas, ĉar Petro kaj lia ĝardeno ne konsistigas unu nedigeblan tuton. Sed mi povus diri: "Mi renkontis Petron kun SIA eterna larĝgranda ĉapelo" se Petron oni neniam renkontas sen tia ĉapelo. Tamen se la subjekto estas mem triapersona oni povas riski konfuzon, kiam la leganto (aŭ aŭskultanto) ne realigas la celitan bildon. Oni do estu tre singarda pri tiu figuro, kiu koncernas pli la stilon ol la gramatikon.

Ĉiukaze la intermeto de "kiu estas" estas tute ne pravigebla.

(S.A., mar.64)

D.: Legante libron de J. Baghy, mi renkontis tiun ĉi frazon: "Li eĉ ne rimarkis vian falon sur sin". Mi ne komprenas la ĝustan sencon de tiu frazo. Ĉu la pronomo SIN estas korekte uzata?

R.: La ĝenerala regulo pri la uzado de la refleksivo (SI, SIA) postulas, ke la refleksivo resendu al la subjekto de la propozicio. Do, SI reprezentas la saman rolanton kiel la subjekto. Se oni strikte aplikas tiun regulon al la ĉi-supra frazo, SIN kaj LI reprezentas la saman personon. Tamen en la frazo efikas alia ag-esprimanta vorto, kiu kaŝiĝas sub substantiva formo: "falon" kaj se oni redonas al tiu vorto la verban formon, la frazo fariĝas: "Li eĉ ne rimarkis, ke vi falis sur (?)". Kiel kompletigi tiun ĉi frazon, aliel ol per "lin"? La frazo de Baghy ŝajnas al mi nebona kaj oni nepre diru:

Li eĉ ne rimarkis vian falon sur lin.

Alia ekzemplo: Ĉu ŝi konscias pri via amo al ŝi? (al si signifus ke vi amas vin mem).

(S.A., apr.51)

Aludita frazo: "Plie, li permesis al esperantisto persekutata de la Gestapo tranokti dum sufiĉe longa tempo en sia presejo".

Kulpas la strikta apliko de regulo, kiun oni instruas en la elementaj kursoj, nome: "La refleksivo ĉiam rilatas al la subjekto de la propozicia verbo".

Nur pro pedagogiaj postuloj oni tiel formulas regulon, kiu,

se ĉiam strikte aplikata, kondukus al tiaj eraroj, kiajn oni renkontas en la citita frazo. Tiu regulo, almenaŭ en la superaĵ kursoj, devus proksimume teksti jene :

La refleksivo ĉiam rilatas al la subjekto de la plej proksima verbo en la frazo.

Ne nur la predikata verbo de la propozicio havas predikatan valoron en la propozicio, sed ankaŭ povas akcesore agi predikate aliaj vortoj, t.e. infinitivoj, substantivoj kaj eĉ adjektivoj. Ĉar predikato havas ĉiam subjekton, aserti, ke verbo en infinitivo ne havas subjekton estas nepre erare. En la kulpigita frazo la subjekto de "tranokti" estas "esperantisto", do la sama vorto, kiu ankaŭ rolas kiel objekto de la ĉefverbo permesas. La infinitiva konstruo de la frazo havas ĝuste tiun avantaĝon ke ĝi ne devigas al ripeto de vorto, pro tio ke tiu vorto diverse rolas rilate al du predikatoj.

En "Leteroj de Lanti" mi elpikis tiun interesan frazon : "Mi amare malbenas la multlingvecon; kiu, pli ol io ajn alia, fremdigas la homojn inter si". Se oni aplikus la ĝeneralan regulon, oni devus diri : "inter ili", ĉar la subjekto de la verbo estas "kiu" (multlingveco). Se oni aplikas la duan regulon, oni rimarkas, ke la adjektivo "fremdaj" (fremdigas = igas fremdaj) agas predikate en la lasta parto de la propozicio kaj ke ĝia subjekto estas "homoj" (la homoj fremdas unu la alian). Do, SĪ, kiu resendas al la subjekto de "fremdaj" estas korekte uzata.

(S.A., dec.49)

LA AKUZATIVO

D.: "Li elektis UNUN el ili". Ĉu ni nepre forigu la akuzativan finaĵon ĉe UNU ?

R.: La numeralo UNU eĉ uzata kiel nedifina pronomo estas nevaria, do ne toleras la signon de akuzativo. Sed, kiam ĝi estas uzata en la pluralo, neĉeŝas signi tiun pluralecon kaj konsekvence ĝian eventualan objektecon. Tio kondukas al tiu stranga konkludo, ke UNU estas nevariebla en la singularo kaj varias laŭnombre kaj laŭkaze en la pluralo. Jen la kaŭzo, kial kelkaj esperantistoj por forigi tiun ĉi neregulecon ĝin variigas laŭkaze ankaŭ en la singularo.

(S.A., jun.60)

Ĉ E A D J E K T I V O .

D.: "...ni trovos Esperantistojn senidealaj...". En "Tempesto sur Akonkagvo (p.13) : " Oni konsilas porti la pak-aĵojn etiketitaj kaj ĉiun veston markita."

Mi ne komprenas kial ne akordiĝas kaze la postmetita adjektivo.

R.: La loko de la adjektivo rilate al la substantivo ne havas influon, ĉu oni akordigu aŭ ne la adjektivon. La kaza neakordigo montras, ke la koncerna adjektivo rolas ne kiel epiteto sed kiel predikativo. En la unua frazo ĝi montras, ke la senidealeco de la Esperantistoj dependas de la opinio de la subjekto, do estas pure subjektiva kaj la frazo signifas : "Ni opinios, ke la Esperantistoj estas senidealaj". Tamen por ke trudiĝu tiu ĉi senco, necesas la artikolo antaŭ la substantivo "Esperantistoj". Verŝajne ne ĉi tiun sencan intencis la skribinto kaj la frazo tute simple signifas : "...ni trovos senidealajn Esperantistojn..." en kiu kazo oni nepre akordigu la adjektivon.

En la dua ekzemplo la kvalitoj "etiketitaj kaj markita" apartenas al la respektivaj substantivoj nur okaze de la ago esprimita de la verbo. La senco estas : "Oni zorgu, ke la pak-aĵoj estu etiketitaj kaj ĉiu vesto markita, kiam oni portas ilin". Se oni akordigus la adjektivojn, la senco estus : "Oni portu la etiketitajn pak-aĵojn kaj ĉiun markitan veston". (Pri la cetero oni ne parolas).

(S.A., aŭg.63)

Ĉ E A P O Z I C I O

D.: "La serba registaro baldaŭ proklamis liberigon de ĉiuj jugoslaviaj popoloj, kiuj vivis sub Aŭstrio, la celon de la milito".

"Sed, ĉar la Germanoj proklamis la militon, fina kalkulo kun Slavoj..."

Mi ne komprenas kial oni uzas la akuzativan formon en la unua frazo kaj kial ne en la dua.

R.: En la unua frazo, la vorto "celon" estas epiteta apozicio de "liberigon", do akordiĝas laŭkaze kun tiu substantivo. La serba registaro proklamis la liberigon de ĉiuj jugoslaviaj popoloj (tiu liberigo estis la celo de la milito). En la dua frazo, "fina kalkulo" estas objekta predikativo de "militon". Objekta predikativo neniam alprenas la aku-

zativan formon (La Germanoj proklamis, ke la milito estas la fina kalkulo kun Slavoj).

(S.A., okt.54)

F O R ...N !

D.: Mi legas en numero de Sennaciulo : "For fanatikismon!". Mi jam bone konas la Lantian sloganon : "For neŭtralismon!". Mi ne bone komprenas la uzon de akuzativo en tiuj esprimoj.

R.: La cititaj esprimoj apartenas al tiu serio de stereotipaj formoj, en kiuj la akuzativa signo estas aldonita ne al la vorto kiun ĝi koncernas, sed al alia vorto, kiu neniel esprimas la celon de la movo. Al tiu serio apartenas : reen, pluen, renkonten... Tiun lastan oni nun korekte uzas sub la formo renkonte al. Ili naskiĝis pro ilia oportuna uzado, sub la impulso de sentoforto spite al la logikeco de la lingvo. Harfendulo eĉ povus demonstri ke la uzo de la akuzativo en "For fanatikismon!" donas al tiu esprimo sencon tute malan al la intencita (for al la fanatikismo!). La logikaj formoj estus: "Foren fanatikismo!", "Foren neŭtralismo!". Sed la forta predikateca valoro de "for" en tiuj esprimoj verŝajne malhelpis ke tiuj formoj estu uzataj aŭ proponataj.

Tio pruvas unu plian fojon, ke logiko estas nur unu el la faktoroj, kiuj regas la lingvaĵon kaj ke ankaŭ la forto de la sentoj kaj pasioj ludas ian rolon.

(S.A., jan.56)

P O S T Ĉ I R K A ŭ kaj P O

En la P.V. oni legas ĉe la vorto "ĉirkaŭ" la jenajn ekzemplojn: Li havas ĉirkaŭ 60 jaroj - La vesto kostas ĉirkaŭ cent frankoj. Poste oni trovas la samajn ekzemplojn sub tiu formo : Li havas ĉirkaŭ 60 jarojn - La vesto kostas ĉirkaŭ cent frankojn. Kial tiuj duoblaj formoj ?

Ĉu la uzo de la akuzativo post ĉirkaŭ estas pravigebla ? En la unuaj du ekzemploj oni konsideras ĉirkaŭ kiel prepozicion, kiu postulas post si la nominativon. En la aliaj ekzemploj oni ĝin konsideras kiel adverbon, kiu rilatas nur al la numeralo kun la senco de proksimume. Ĉar adverbo neniel influas sur la sintaksa rolo de la sekvanta komplemento, do ĉi tiu devas alpreni la akuzativan N, se neniu prepozicio ĝin antaŭas.

Dum Zamenhof neniam uzas la akuzativon post ĉirkaŭ, Kabe kaj multaj aliaj bonaj stilistoj ĝin uzas. Ekz.:

La koncerto daŭris ĉirkaŭ tri horojn. Lia infanterio marŝas

dum unu tago ĉirkaŭ 13 egiptajn mejlojn.

La saman distingon oni povas fari en la uzado de la vorteto PO, kiu rolas jen prepozicie jen adverbe. Oni legu pri tiu vorto la necesajn klarigojn en la P.V. Estas interese ekscii ke Zamenhof, en siaj Lingvaj Respondoj, neniel kontraŭstaras la uzadon de la akuzativo post PO en la jena ekzemplo :

doni po du pecoj kaj doni po du pecojn.

(E.L., apr.49)

M.C. BUTLER : Jes, en plej frua tempo la demando ĉu PO estas prepozicio aŭ ne, estis afero diskutebla, kaj en Lingva respondo, dato 1891, Zamenhof ne volis decidi inter doni po du pomoj(n).

Tamen, kion li mem faris ? Nur dufoje li uzis post PO akuzativon : Dua Libro 1888, kaj Originala Verkaro (1905) sed neniam poste. Kaj mi posedas 228 frazojn, en kiuj li uzis post PO nominativon. Klare do, laŭ Zamenhofs uzado PO estis prepozicio kaj bezonas post si nominativon.

Pri ĉirkaŭ : Jes, oni uzas ĝin jen prepozicie, jen adverbe (= proksimume). Do, anstataŭ : La koncerto daŭris dum ĉirkaŭ du horoj, oni povas diri : daŭris ĉirkaŭ du horojn. Tamen tiu duobla uzado estas iom konfuziga, kaj oni eĉ povas konfuzi sili, por klareco, ĉiam uzi la adverbbon proksimume : La koncerto daŭris proksimume du horojn.

Respondo de F. Baronnet:

Se paroli nur pri logiko, ĉiu esperanto-vorto devus havi nur unu gramatikan karakteron. Tamen la lingvouzo donis al kelkaj vortoj karakteron respektive jen adverban jen subjunkcian, jen adverban jen prepozician, ktp. Ĉu tiu hibrideco alportis ĝenon aŭ konfuzon en la uzado de la lingvo ? Tion mi ne kredas kaj mi neniam spertis, ke la adverbsa uzo de ĉirkaŭ estigis tian malprecizon, ke sin trudis al mi la uzo de proksimume.

Nun oni senkompate ekstermas la uzon de ĝis kaj dum kiel subjunkciojn spite al la Zamenhofs uzado, plipezigante la frazojn per la aldono de kiam. Ĉu tiun tendencon pravigas logiko kaj klaro ?

Nek blinda konservatismo nek senpripensa evoluismemo estas per si mem aprobindaj. La solaj kriterioj, kiuj povas iel helpi al la komuna lingvo-uzanto estas la klaro kaj harmonio kaj krome minimuma logiko kaj konsekvenco.

(E.L., okt.49)

P O S T O L

D. : En la rubriko "Por la komencantoj" mi trovas cititan el la P.V. : "...kiam ci estas deziranta nenion alian ol tio, kion ci havas". Mi tie ĉi dirus : "ol tion". Ĉu mi pravas ?

R. : En tiu ĉi frazo la vorteto OL ludas la saman rolon, kiel la prepozicio KROM. Mi legas en la P.V. : "Se ALIA estas akompanata de negacio, oni povas post ĝi uzi indiferece OL aŭ KROM : La kongreso ne povos elekti ian alian lingvon krom lingvo arta (Z) Same bone oni povus diri : "...ian alian lingvon ol lingvo arta". Estas nedubeble, ke en tiuj ekzemploj ambaŭ vortoj estas uzataj prepozicie, kvankam la P.V. registras KROM kiel prepozicion kaj OL kiel konjunkcion. Tio pruvas unu plian fojon kiel malfacile estas surglui ĝustan etiketon sur gramatikan flakonon, neklarinte ties enhavon.

La citita frazo estas do tute korekta.

(S.A., feb.65)

Post S I G N I F I

D. : Mi trovis jenan frazon : "Varboto ne nepre signifas idioto". Ĉu temas pri preseraro ? Kial ne estas N. ĉe "idioto" ? Ĉu signifi ne estas transitiva verbo ?

R. : La limo inter transitiva kaj predikativa verbo ne estas absoluta. En tiu frazo la verbo perdis multe el sia transitiveco. Ĝia senco reduktiĝis preskaŭ al tiu de simpla kopulo :

"Varboto ne estas idioto".

"Idioto" fariĝis ne objekto de la verbo sed predikativo de la subjekto.

Komparu la frazojn :

Tiu konferenco signifas MULTON por nia movado. (havas grandan signifon). La transitiveco estas evidenta.

Por iuj personoj esperantisto signifas utopiisto. (estas utopiisto). La transitiveco estas nula.

En la citita frazo la lingvosento de la aŭtoro kondukis lin uzi la nominativon.

(S.A., jul.65)

P O S T Ĝ I S

D. : "Oni akceptas personojn ĝis 40 jarajn". Iam mi lernis ke, post "ĝis" oni neniam uzu la akuzativon. Ĉu tiu uzo ĉi tie estas erara ?

R. : Estas eraro diri, ke post "ĝis" oni neniam uzas akuzativon ĉar ne ĉiam tiu vorto estas prepozicie uzata. En la koncerna

ekzemplo ĝi rilatas ne al la substantivo "personojn" sed al la numeralo "40"; ĝi do estas adverbo kaj neniel influas la kazon de la posta substantivo. Ĝia signifo estas proksimume "maksimume". La frazo signifas : "Oni akceptas maksimume 40-jarajn personojn", frazo en kiu la adverbo "maksimume" rilatas al la numeralo "40" kaj ne al la verbo "akceptas".
(S.A., mar.68)

ALMOVA AKUZATIVO

POST ĈE

Esperanto disponas pri du rimedoj por signi la al-movon :

1° uzo de la prepozicioj AL kaj ĜIS;

2° uzo de la akuzativa N.

La celon de la al-movo montras jen simpla substantivo, jen loka adverbo, jen loka prepozitivo (prepozicio + substantivo).

Ekz.: Morgaŭ mi veturos Parizon. Nun ni iru hejmen.

Oni forpelis lin ekster la ĉambron.

Teorie ĉiuj lokaj prepozitivaj povas signi la celon de la movo, do ankaŭ la ĉe-prepozitivo. Ekz.: La pilko ruliĝis al la muro. Mi rapidis al mia onklo. Tio signifas, ke Zamenhof neniam sentis la bezonon pliprecizigi la celon de la movo per la prepozicio "ĉe". Fakte la diferenco inter la ĉi-supraj ekzemploj estas sensignifa kaj estas senutile ĝin akcenti, krom en tiu kazo en kiu oni atribuas al la prepozicio "ĉe" la sencon de en la domo de. Sed tiu senco estas nur akcesora kaj la saman senco oni povas same bone atribui al la prepozicio "al", kiam temas pri almovo : t.e. en la domon de. Necesus nur, ke niaj vortaroj ĝin indiku. En tio kuŝus nenia arbitro, sed simpla konstato de la Zamenhofa lingvuzo, kiu paralelus kun la respondaj ĉe-prepozitivaj.

Konklude la uzo de la akuzativo post ĈE estas senutila kaj nekonsiderinda. Oni ĉiam prefere uzu la prepoziciojn AL kaj ĜIS.
(S.A., okt.50)

Rimarkoj de An Kaŭ: Mi ne konsentas kun la F.B.-artikolo.

Ja skribas Kalocsay-Waringhien en la P.G. (p.270) : "Logike oni povas uzi akuzativon ankaŭ kun ĉe : "venu ĉe min". Sed la tradicio, sekvante la ekzemplon de Zamenhof, rigardas tian uzon nekorekta kaj aplikas anstataŭ ĝi la prepozicion al".

Sed pluraj aŭtoroj ne malkonsilas la akuzativon post ĉe (P.V., vd. ĉe; Grosjean-Maupin, Franca-Esp. Vortaro, vd. à). Precizigas Fruictier-Grenkamp (Kompleta Gramatiko, p.143): "ĉe... oni uzas plej ofte kun nominativo por montri restadon, haltadon "sidi ĉe tablo" dum la movon oni prefere esprimas per al : iri al la tablo. Tamen kelkaj uzas ĉe kun akuzativo por montri ke oni atingis la celon : "iri ĉe la najbaron", dum al montras simplan direkton".

Diskutinte pri tio kun lertaj germanaj esperantistoj, mi opinias ke la Zamenhofa tradicio devenas de misa paraleligo de ĉe kun la germana prepozicio "bei", kiu ne toleras la akuzativon. Pli ĝuste ĝi respondus al la germana "an", kiu montrus tute glatan uzon de ĉe : "la bildo pendas ĉe la vando" (= an der Wand), "mi pendigas la bildon ĉe la vandon (= an die Wand)". Konfirmon mi trovas en Zamenhof mem (Lingvaj Respondoj, 2-a eldono, p.44) : "post prepozicioj... kiuj per si mem ne montras direkton... ni uzas la akuzativon, por esprimi direkton... Ni post la diritaj prepozicioj povas uzi ambaŭ kazojn, malgraŭ ke en aliaj lingvoj oni uzas post ili ĉiam nur unu kazon..." (substrekis Z. mem).

Pliajn klarigojn oni trovu ankaŭ en L.R., p.45,71 : "al ordinare montras nur la celadon, la vojon al iu loko, dum la akuzativo povas enhavi en si ankaŭ la ideon de atingo de la celo"; kaj p.40 : "la akuzativo en nia lingvo neniam dependas de la antaŭiranta prepozicio, sed nur de la senco".

Tio estas simple logika apliko de du fundamentaj reguloj : Fundamenta gramatiko, §8 : "ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon".

Kaj §13 : "por montri direkton la vortoj ricevas la finaĵon de la akuzativo".

Aldoninde estas, ke la senco de ĉe tro ofte estas misforĝesata: la originala signifo estas : tuseco, pli proksima ol apud (post kiu neniu diskutas la akuzativon), kaj kelkfoje esprimata per alia prepozicio : kontraŭ (vd. Fruictier, p.156), sur (P.V., vd. sur, §4).

En ĵusa traduko, mi skribis : "kraĉi ĉe la vizago". Tion permesas la gravega gramatika principo "Neceso kaj sufiĉo". Necesas ĉe, pli preciza ol sur (oni ne kontestus al mi : "sur la vizago"); ne sufiĉus al, ĉar "kraĉi al la vizago" estas alia afero.

Konklude mi bedaŭras ankoraŭfoje, ke niaj gramatikistoj ne sufiĉe abstraktas sin el la nacilingvaj gramatikoj. Eĉ la pacien-

ca ellaborado de Zamenhof ne evitis ĉiujn naciaĵojn. Ni bezonas sennaciecan esperantan gramatikon.

(S.A., jan.51)

Respondo de F. Baronnet:

Ni ne estu pedante troprecizemaj.

Mi tute konsentas pri la rimarkoj, kiujn An-Kaŭ prezentas en la januara numero, responde al mia artikolo pri la akuzativo post ĉe. Mi akcentas, ke la uzo de la akuzativa ĉe-prepozitivo tute ne ofendas la logikon kaj la fundamenton. Mi nur asertas, ke ĝi estas senutila troprecizigo kaj estas uzenda en tre malmultaj okazoj. Mi ne komprenas, kial "kraĉi ĉe vizaĝon" estas pli preciza ol "kraĉi sur vizaĝon". Kial diri "mi pendigas la bildon ĉe la vandon" ? Mi simple dirus "ĉe (aŭ sur) la vando". Ĉi tie la akuzativo estas nur balasto. Kiam la instruisto sendas malbonan lernanton al la hontangulo, li ne diras al li "iru ĉe la hontangulon", sed "al la hontangulo", kio estas pli esprimforta ol la akuzativa ĉe-prepozitivo. En ĉi-lasta kazo la akuzativa N troviĝas en neakcentita silabo kaj perdas sian voĉan esprimovon. Kiam li sendas lernanton skribi sur la nigra tabulo, li simple ordonas "iru al la tabulo" ("ĉe la tabulon" signifus ke li devas halti ne antaŭ ol lia nazo tuŝos la tabulon). Se homoj vidas arestiton inter du ĝendarmoj, unuj diros : "oni kondukas lin al la malliberejo"; tiuj kiuj ŝatas precizemon diros : "oni kondukas lin en la malliberejon". Kvankam nuance diferencaj, ĉu ambaŭ frazoj ne esprimas la saman ideon ? Kiam oni kondukas arestiton al la malliberejo, estas memkompreneble ke tion oni faras ne por admirigi al li la eksteran arkitekturon de la konstruaĵo (tiam oni ne pre devus diri "ĉe" aŭ pli ĝuste "apud") sed por ke li konatiĝu kun la interna.

En unu letero Lanti akre kritikis la idismon, t.e. la troan strebon al logikado; oni tute same kritikis la troan precizemon, kiu fontas el la sama deziro al nepra raciigo de la lingvaj formoj. La sentoj, la pasioj postulas esprimilojn, kiujn la matematika logiko rajtas kondamni; sed estas vane provi ilin forĵeti, se, pro sia simpla kaj konciza ili jam akiris la lingvan civitanecon.

Ni estu atentemaj, ke nacilingvaj mallogikaj idiotismoj ne enpenetru en esperanton kaj difektu ties harmonian strukturon sed, pretekste ke nekutima esprimo apartenas al iu aŭ

alia nacia lingvo, oni ĝin ne forĵetu, se nur ĝi prezentas minimuman logikon kaj internaciecon.

(S.A., feb.51)

Post S I D I Ĝ I

D.: Ĉu oni povas uzi la akuzativon post la verbo "sidiĝi" ?

R.: Ne malofte oni renkontas la akuzativon post tiu verbo.

Ekz.: li sidiĝis sur benkon.

Se oni sin bazas sur la simpla logiko, tiu uzado ne estas pravigita. La verbo "sidiĝi" signas ne movon, sed ŝanĝon de stato : "igi sidanta". Adjekto de tiu verbo ne povas signi celon de movo, sed nur la lokon sur kiu la ŝanĝo de stato okazas. La almovan akuzativon oni povas maksimume pravigi per subkomprenata akcesora movo. Li sidiĝis sur benkon = Li iris sur benkon kaj tie sidiĝis.

(S.A., mar.52)

Pri kelkaj A D V E R B A J F O R M O J

Mi ricevis informpetojn pri la ĝusta signifo de la adverbaj formoj : pluen, returnen, renkonten, reen kaj aliaj. Ĉu la uzo de la akuzativa N estas pravigebla en tiuj vortoj ?

Lau la P.V., la adverbo PLU montras la daŭradon aŭ neĉesadon de ago aŭ stato. La formo PLUE estas nur pliakcentita formo de tiu adverbo. Ĝi do estas tempa adverbo, kiun oni povas uzi metafore kiel loka adverbo. "Mi ne povas iri plu" signifas samtempe "Mi ne povas daŭrigi la iradon" kaj "Mi ne povas iri pli malproksimen". Por pli draste akcenti tiun duan signifon, multaj esperantistoj kaj Zamenhof mem uzas la formon PLUEN. Abram iris pluen, ĉiam pluen al la sudo.

Tiu formo estas nepre mallogika kaj evitenda. La akuzativa N signas direkton al la loko esprimita de la radikilo. Hejmen = al la hejmo; ĉielen = al la ĉielo. Ĉar PLU ne esprimas celpunkton, la vorto PLUEN ne povas ricevi akcepteblan sencion. Tamen la uzantoj de tiu formo povas silentigi siajn konscieneriproĉojn per la jena sofismo : kiam ni uzas la vorton PLUEN, ni ne intencas diri : al plu, sed "plu antaŭen", "plu malproksimen" kaj la vorton PLUEN oni devus skribi "plu'en", en kiu la apostrofo anstataŭas la radikilon "antaŭ" aŭ "malproksim". "Li ne povis iri pluen" signifas "Li ne povis iri plu (antaŭ)en." Se tiu rezonado kontentigas vin, uzu plu tiun koncizan vorteton kaj dormu trankvile.

La vorto RETURNEN estas same mallogike formita kiel PLUEN. Ĝi egalas "al la returno", kiel "hejmen" signifas "al la hejmo". Sed ne la returnon oni celas sed la deirpunkton de la primitiva movo, kaj nur la vorto, kiu signas tiun deirpunkton povas alpreni la finaĵon N. Ekz.: La kato saltis de la tablo sur la arbon kaj poste sur la tablon returne. Estus eraro diri "returnen sur la tablo".

Oni same povus malpravigi la uzon de la adverboj RENKONTEN, REEN. Oni ne diru: Mi iris renkonten al mia amiko, sed : Mi iris al mia amiko renkonte; ĉar la celo de la movo ne estas la renkonto, sed la amiko. RENKONTE estas nur maniera adverbo.

La vorto REEN ŝuldas sian oftan uzadon al sia koncizo, kaj oni povas kompreni ĝin same kiel PLUEN per apostrofado de la eliziita radikoj "malantaŭ". Reen = re (malantaŭ)en. Estas rimarkinde, ke la aŭtoroj de la P.V., kiuj signis la vorton PLUEN per la malbonfamiga (Ev.) ne same atentigis la leganton pri la evitindeco de la vorto REEN, kiu estas same mallogike formita.

(E.L., okt.46)

Post P R E T E R

En la P.G. oni diras (§ 320) ke post la prepozicioj AL, DE, EL, ĜIS, PRETER, oni neniam uzu la almovan akuzativon, ĉar ili per si mem jam esprimas sufiĉe la movon. Dum AL kaj ĜIS montras per siaj komplementoj la celon de la movo kaj DE, EL la originon de la movo, la prepozicio PRETER montras per sia komplemento la aĵon flanke de kio okazas la movo. Ĉar tiu komplemento neniam povas esprimi la celon de la flankmovo, ĝi ne povas alpreni la akuzativan N.

La P.V. donas precizan difinon de tiu prepozicio kune kun kelkaj ĝin ilustrantaj ekzemploj : Li pasis preter mi sen saluto. En la gramatiko de P. Fruictier oni trovas preskaŭ similan difinon kun la jenaj ekzemploj :

Silente ni iris sur la strato preter la fenestroj, kie sin kaŝis nia belulino. Traflugis anĝelo preter orelo. Laŭ tiuj ekzemploj la malpermeso de la P.G. estas plene pravigita.

Sed, post la ĉi-supraj ekzemploj, mi legas en la P.V. : La enirejo troviĝas preter tiuj fenestroj. Sekvu la vojon kaj preter tiuj arboj vi trovos la statuon.

En tiuj ekzemploj la preter-prepozitivo estas loka adjekto de verboj, kiuj ne esprimas movon; ĝi signas lokon kun la subkompreno ke oni atingas aŭ povas ĝin atingi nur per flankmovo. Tiu nuanco tute ne estas montrita en la difino kaj tamen ĝi estas tre grava, ĉar, esprimante nur spacopunkton la prepozitivo povas alpreni la almovan akuzativan N, se ĝi fariĝas celo de alia verbo de movo. Se mi iras al la statuo preterirante la arbojn, mi povas diri :

"Mi iras preter la arbojn" Dum la simpla "Mi iras preter la arboj" signas nur la flankmovon, la akuzativo signas la celon de la flankmovo.

Alia ekzemplo : "mia domo troviĝas preter la preĝejo" (nominativo). "Se vi volas trovi mian domon, iru preter la preĝejon" (akuzativo).

Por konformigi sian difinon al la donitaj ekzemploj, la P.V. devus kompletigi ĝin aŭ indiki tiun lokindikan nuancon per cifero 2. Prepozicio montranta lokon atingeblan nur per flankmovo.

Tipa estas la ekzemplo de Zamenhof : "ĝi iris al li preter la buŝon". La celo de la movo estas LI kaj la almovo estas esprita per la prepozicio AL. Ĉar "preter la buŝon" estas epiteto de LI, ĝi devas esti enkondukita per la sama prepozicio AL, kiun anstataŭas la akuzativa N. La Zamenhofs lingvuzo tute konformiĝas al tiu sencnuanco, kiun la P.V. preteratentis.

(E.L., feb.51)

L A A B S O L U T A P A R T I C I P O

Sur la kovroplato de mustardpoto mi legas jenan surskribon : "Mon couvercle remplacé, mon arôme sera conservé".

Mi tute ne intencas reklami pri tiu aŭ alia mustard-firmo, sed nur atentigi la uzantojn de esperanto, ke tiu frazo estas tipe franclingva, kaj ke ĝia konstruo estas tute fremda al nia lingvo, do ne imitenda. La participo "remplacé" ludas en la unua parto de la frazo rolon de predikato kun propra subjekto "couvercle". Tiun uzon de la participo oni nomas "absoluta participo". Tio signifas, ke ĝi havas nenian rilaton al la elementoj de la ĉefprepozicio, sed konsistigas mem propran prepozicion.

Sub la influo de la gepatraj lingvoj, kelkaj esperantistoj ne malofte eraras, imitante tiun formon. Ekzemple, tiu frazo:

"Ĉio konsiderata, se ili ne estus malobeintaj, ili estus vivintaj in saecula saeculorum".

La frazelemento "Ĉio konsiderata" konsistigas apartan propozicion kun sia propra predikato konsiderata kaj ties subjekto ĉio. Ĝi estas ekzemplo de absoluta participo, kies uzado estas kontraŭa al la spirito de nia lingvo. Kiel do korekti tiujn frazojn ? Ni disponas pri tri rimedoj inter kiuj ni povos elekti :

- 1° Transformi la partician propozicion en ordinaran subpropozicion;
 - 2° Uzi particip-forman adverbkonstruon kun rilato al la subjekto de la ĉefpropozicio (do ne absolutan);
 - 3° Uzi ne participforman adverbkonstruon, kiam eblas.
- Jen la korektitaj frazoj :

Se vi remetis mian kovroplaton, vi konservos mian aromon.
(unua rimedo).

Remetante mian kovroplaton, vi konservos mian aromon (dua).
Konsidere ĉion, se ili ne estus malobeintaj. (tria rimedo).

Ni klopodu ne enkonduki en esperanton nacilingvaĵojn kaj konservi al nia lingvo ĝian propran kaj originalan karakteron.
(S.A., nov.50)

D.: En la katalogo de Manufacture de Saint-Etienne mi ĝoje trovis kvaronpaĝon en Esperanto, sed ankaŭ jenan frazon :
"Niaj pakoj estante ĉiam zorgege efektivitaj, niaj klientoj devas neniam toleri, ke ili estu kulpigitaj..."

R.: Tiu frazo estas korekta nek laŭ stilo nek laŭ la gramatiko. Ĝi estas tipa ekzemplo de absoluta participo, t.e. de participa propozicio kun propra subjekto. Ĝi devus aspekti jene :

"Ĉar niaj varoj estas zorgege enpakitaj, niaj klientoj neniam akceptu esti kulpigitaj pro ilia difektiĝo".
(S.A., aŭg.55)

D.: "Krom la malnova urbo, irante la ĉefan straton Marszałkowska, la domoj tute diferencas". Ĉu tiu frazo estas korekta ?

R.: Tiu frazo estas tipa ekzemplo de absoluta participo, t.e. de participo kies subjekto ne estas tiu de la ĉefpropozicio. Tiu frazkonstruo ne estas permesita en Esperanto. Oni samigu la subjektojn aŭ oni uzu apartan subpropozicion.

"Krom la malnova urbo, irante la ĉefan straton M., oni rimarkas ke la domoj tute diferencas" aŭ "se oni laŭiras la ĉefan straton M., la domoj tute diferencas".

(S.A., feb. 59)

D.: "Atendante vian afablan respondon, akceptu miajn plej korajn salutojn".

R.: En tiu ĉi frazo la particip-adverbo ne rilatas al la subjekto, do staras absolute. Oni povas korekti jene: "...mi petas vin akcepti miajn plej korajn salutojn".

(E.L., jan.46)

L O K I G O de N U R

D.: Mi legas: "Ĉi-jare pro la alta vojaĝkosto ni povos nur monsubteni kandidaton al Toronto". Ĉu la signifo de tiu frazo kongruas kun tiu intencita?

R.: Oni diras ke en Esperanto la vortordo en la frazo estas libera. Tiu aserto estas nur parte vera. Ekzistas vortoj, precipe adverboj, kies loko ne estas indiferenta kaj ebligas la esprimon de delikataj nuancoj. Inter tiuj vortoj la adverbo NUR estas aparte ekzempliga. Oni legu en la PIV jenan konsilon: "Same kiel NE la adverbo NUR devas ĉiam stari antaŭ la vorto kiun ĝi koncernas kaj limigas." En la ĉi-supra frazo ĝi staras antaŭ la verbo, do limigas ties sencon kaj la frazo signifas, ke oni ne povas fari ion alian ol subteni kandidaton, ekzemple honorarii kursgvidanton, repagi vojaĝelspezojn, ktp, kio ne estas la celita senco. Tiu senco estas, ke oni ne povas monsubteni "pli ol UNU" kandidaton. La adverbo NUR devas do stari antaŭ la numeralo UNU, kiu for- estas el la frazo. Tiu ĉi do devas teksti jene:

"Ĉi-jare pro la alta vojaĝkosto ni povos monsubteni nur UNU kandidaton al Toronto".

En lasttempe recenzitaj verkoj mi ofte bedaŭris la neĝustan lokigon de la adverbo NUR kaj atentigis ke, kiam tiu vorto ne senpere staras antaŭ la vorto kiun ĝi koncernas, ĝi perdas multe de sia esprimforto, eĉ kiam ĝi ne aliigas la sencon de la frazo.

(S.A., apr.73)

 ** LA STILO **

LA ESPERANTA STILO

En la studo de Esperanto, ne malofte okazas, ke progresintoj, kiuj ĝisfunde konas la regulojn de nia simpla gramatiko kaj ilin senhezite aplikas, kiuj sufiĉe lerte uzas la vortaron, alvenas al tiu krucpunkto, kie ili ŝajne skribas seneraran lingvon, sed tamen malfacile akcepteblan pro la malbona stilo. Ili kontaktiĝis kun la lingvo nur tra la striktaj gramatikaj reguloj, akiris vorttrezoron nur el vortara traserĉado. Ili ne ekkonis la vivantecon de la lingvo el la tekstoj de niaj bonaj stilistoj, eĉ ne de la aŭtoro de Esperanto.

Kelkaj konsiloj povos iel utili al ili : ili koncernas la plej ofte renkontatajn stilajn mankojn.

- 1° Eviti la tro longajn aŭ malbelsonajn kunmetaĵojn; Kilometra vorto malfacile prononcebla malbele efektas meze de la frazo.
- 2° Ellasi la senutilajn afiksojn per kiuj la komencantoj emas garnituri kaj ŝveligi la plej simplajn vortojn. Oni strikte apliku la principon pri neceso kaj sufiĉo. Ekz.:
 Li elĉerpis sitelon da akvo el la puto
 (Li ĉerpis sitelon da akvo el la puto).
- 3° Neuzado de la kompleksaj verboformoj en la limoj, en kiuj ilia ne estas nepre necesaj. Malgraŭ ilia ŝajna pliprecizigo de la temporilatoj inter la agoj, ili estas plej ofte eviteblaj. Ekz.: Kiam ili estis alvenintaj, ili tuj altabliĝis. (Tuj post ilia alveno, ili altabliĝis).

Esperanto havas tiun avantaĝon, ke, dank'al la aglutina karaktero de sia vortfarado kaj al la granda libereco de sia frazkonstruado, ĝi same bone akceptas tre koncizajn sintezigitajn esprimojn kaj ankaŭ la pli analizajn formojn de niaj okcidentaj naciaj lingvoj.

Laŭ la postuloj de la klaro kaj de la belsoneco, la lernanto povas do elekti tiujn formojn, kiuj plej respondas al tiuj postuloj. Ĉu diri "ŝtonponto aŭ ŝtona ponto, fervojbileto aŭ fervoja bileto, la franca poŝtadministracio aŭ la administracio de la franca poŝto" tio estas afero de elekto, kaj stilo estas elekto inter egale korektaj formoj, kiujn, dank' al sia fleksebleco, la lingvo proponas al ni.

(E.L., maj.50)

NECESO kaj SUFIĈO

Estas ĝenerale observate, ke la novlernintoj de nia lingvo, konsciaj pri ties riĉo je afiksoj kaj ilia facila uzeblo, svarmigas sian stilon per abundo de tiuj vortelementoj, kun la kredo, ke ju pli da precizigiloj entenas vorto, des pli valora ĝi estas por la bona kompreno. Tiu erara opinio devas esti kontraŭbatalata; jam antaŭ la unua mondmilito René de Saussure en sia studo pri la vortfarado, starigis regulojn pri la uzado de la afiksoj. Sub la nomo "principoj pri neceso kaj sufiĉo" ili, kun kelka modifo, estis oficialigitaj de la Akademio en 1913.

a) Principo de neceso. En konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

b) Principo de sufiĉo. Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj ne necesa.

Unuavide tiuj reguloj estas tre klaraj, sed post ioma pripensado, oni povas sin demandi, ĝis kia grado la kunteksto povas permesi ellason de tiu aŭ alia afikso. Ĉu en la frazo "mi perdis la tranĉ(il)on, kiun vi akr(ig)is", oni povas forĵeti la sufiksojn IL kaj IG kun la motivo, ke la kunteksto sufiĉe komprenigas la stumpigitajn vortojn? Ne, ne! La lasta regulo validas nur por tiuj afiksoj, kiuj alportas en la sencan de la vorto nuancon modifon jam esprimitan de la kunteksto aŭ de alia sufikso; ĝi ankaŭ koncernas la gramatikajn finaĵojn nepleonasmajn, kies senco estis neniam precizigita kaj restis sufiĉe elasta por akcepti pliprecizigon fare de la kunteksto. Jen kelkaj kazoj:

1. Ellaso de la sufikso AD por signi la kutimon en la pasinteco (responda formo de nia imperfekto).
2. Ellaso de la sufikso EC en la komplekso EMECO. Dankemo anstataŭ dankemeco.
3. Ellaso de la sufikso EC post adjektivsencaj radikoj. Libero anstataŭ libereco.
4. Pli aŭdaca estas la ellaso de la sufikso UL en la komplekso ULINO. Virgino anstataŭ virgulino.
5. Ellaso de la sufikso AD kaj AJ post verbaj radikoj, lasante al la kunteksto la taskon difini ĉu temas pri la ago mem aŭ pri ties konkreta rezulto. Desegno anstataŭ desegnado aŭ desegnaĵo.

6. Ellaso de la participaj finaĵoj ANT kaj AT en la transitivaj faktitivaj verboj. Manĝigi anstataŭ mangantigi kaj mangatigi.

Resume, apliko de la principo pri sufiĉo estas afero de kompromiso inter la matematika formo kaj la postuloj de la stilo. Kvankam la evoluo de la lingvo tendencas al ĝia plua simpligo, ankoraŭ restas konservativaj kvazaŭ tradiciaj fortoj, kiujn neglekti oni tute ne povas.

(E.L., jun.52)

Pri la I D I O T I S M O J

Unu el la ĉefaj obstakloj, kiujn renkontas la kandidatoj en siaj tradukekzercoj estas la idiotismoj, kiuj fojfoje baras al ili la vojon al facila kaj rapida traduko de la teksto. Ilin vesti per korekta kaj akceptinda esperanto-formo estas karakteriza trajto de la lerta tradukanto. Laŭ ilia naturo oni povas klasifiki la idiotismojn en du kategoriojn : la gramatikajn kaj la stilajn. Al tiu lasta kategorio apartenas ankaŭ certaj metaforaj esprimoj.

La gramatikaj idiotismoj estas specialaj formoj propraj al ĉiu lingvo, kiuj spitas al ĉiaj logikaj reguloj en la sintakso, en la konjugacio kaj entute defias ĉian analizon aŭ racian klarigon, ĉar tiuj formoj svarmas en la komuna uzado de ĉiuj naciaj lingvoj, ili sin trudas al la spirito en la esprimo de niaj pensoj. Por la nova esperanto-lernanto, kies lingva materialo ankoraŭ ne estas sufiĉe grava por ebligi al li fluan parolon kaj skribon, ili konsistigas seriozan baron. Vole nevole eĉ lertaj verkistoj estas pli malpli influataj de tiuj nacilingvaj formoj. Ĉe Zamenhof kaj Kabe oni sporade renkontas slavismojn kaj germanismojn. El inter la gramatikaj idiotismoj ni citu i.a. la uzo de nea vorto en kazo, kiam ĝi tute ne necesas. Ekz.: Vi ne estas haringo - ŝi diris, rigardante la laboron, kiun ŝi tenis en la mano, verŝajne pro timo, ke ŝi denove ne ridu... (Marta). En la franca lingvo oni renkontas la saman idiotismon en la subjunkcio :

Ekz.: Je crains qu'il n'ait manqué le train.

Mi timas, ke li maltrafis la vagonaron.

Oni povas konsideri gramatikaj idiotismoj la fantazian uzadon de la tempoj kaj modoj en niaj konjugacioj, i.a. en la nereкта parolo :

Ekz.: Il m'a dit qu'il viendrait.

Li diris al mi, ke li venos.

Ankaŭ gramatikaj idiotismoj estas tiuj formoj, kies senco nur de malproksime rilatas al iliaj konsistigaĵoj. Ekz.:

Vous l'avez échappé belle.

En la angla lingvo oni renkontas la respondan formon:

You had a narrow escape (prosperis al vi elsaviĝi).

La francaj verboj "faire, prendre, mettre" eniras en la formadon de multaj idiotismoj: faire peur (timigi), prendre le mors aux dents (ekfuriozi), mettre bas (naski idojn), ktp.

Jam ni kontaktas kun la stilaj idiotismoj, kiuj precipe estas metaforaj esprimoj pli malpli kompreneblaj de alinacilingvuloj. Mi ĵus legis en loka ĵurnalo interesan ripentron de la ĉina ĝentileco, kiu naskis en la sociaj rilatoj abundon da kuriozaj metaforaj esprimoj. Ekzemple, parolante pri ĵus mortinta funkciulo, oni neniam diras, ke li mortis, sed ke li jam ne enspezas sian salajron. Pri ordinario, oni simple diras, ke li praĝis. Subaĉeti ies silenton tradukiĝas "ŝuti dormon"; simpla fungo fariĝas "fea ombrello" kaj orango estas "ora pomo".

En la "Nevenkebla Ĝeno" de Thuysen, oni trovas la interesan metaforon "kuŝi kurbe" en la senco "esti ĝenata pro monmanko". Jen kuŝas grava demando por la tradukanto, kiu staras antaŭ la dilemo: ĉu traduki laŭsence? ĉu traduki laŭforme? En la unua okazo oni tute forigas la sukcon de la esprimo, kiun oni anstataŭigas per banalaĵo. En la dua kazo, oni riskas nekomprenon. Akceptinda kompromiso estas: traduki laŭvorte kaj piednote klarigi la esencon de la metaforo. Tiamaniere oni konservas la koloron de la originalo respektante la rajton de la leganto al nepra kompreno. (E.L., apr.50)

D.: Mi trovas la jenan frazon: "Laŭ mia scio estas la unua fojo ke verkisto esperantista kuragiĝas propagandi Esperanton". Ĉu tiu frazo estas korekta?

R.: Tiu frazo, kiu estas nur laŭvorta imito de franca idiotismo, ne estas korekta. Oni devas diri: "Laŭ mia scio estas la unua fojo, kiam verkisto esperantista..." Tempa subordita pozicio neniam povas esti enkondukita per "ke". Komparu: "Ĉiufoje kiam mi renkontas lin, li min salutas".

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-pens-kaj agadkapablo; kaj oni povus aldoni... kaj de kutimiĝu de la naciaj parolturnoj, kiujn trudas al ilia pensprimo la ĉiutaga uzado de la nacia lingvo. En la citita frazo oni nur celas akcenti la unua-

fojecon de la ago esprimita de la ĉefpropozicia predikato. Dum la naciaj lingvoj sin helpas per diversaj rimedoj, kiuj neniel rilatas al la logiko, Esperanto povas uzi pli raciajn formojn, dank'al sia fleksebleco kaj libera vortordo. Oni povus diri : "unuafoje verkisto esperantista...". Se la logiko de la adverbo kapen de la frazo ne sufiĉe ĝin akcentas, oni povas sin helpi per aliaj adverboj : "Jen unuafoje..." aŭ "Ja unuafoje..." Jen pure indiĝenaj formoj, kiuj ne haldze fontas el nacilingvaj idiotismoj.

(S.A., jun.51)

 * NOVAJ LINGVAJ *
 * TENDENCIOJ *

D.: Uzo de FAR. P.I.V. permesas uzi la vorteton FAR anstataŭ "fare de". Oni do ĝin uzas, sed ĉu iafoje ne mise ? Mi ofte vidis FAR anstataŭ "de" post pasiva verbo antaŭ aganto de l' pasivo, ekz. : "Jen kio estas demonstrata far la registaroj". Ĉu tia uzo de FAR estas korekta ? En alia kazo, ekz. "eviti ĉian revengon far la Hitleranoj", ĉu DE ne sufiĉus, ĉu vere ĝi povus estigi konfuzon ?

R.: Tiu demando estas nur parto de pli vasta demando pri la neceso de la neologismoj. Same kiel ĉiuj vivantaj lingvoj, Esperanto estas submetita al diversaj influoj, kiuj diktas ĝian evoluon. La uzado de novaj vortoj konsistigas gravan parton de tiu evoluo. Sed ĉu tiun uzadon oni povas direkti laŭ saĝaj pripensitaj reguloj aŭ ĉu tiun uzadon oni lasu senbride trafi en la haŭson ?

Estas evidente ke al novaj konceptoj kaj objektoj oni atribuu novajn vortojn, kiam la tradicia terminaro ne kapablas difini ilin. Tiun neceson trudas al ni la teĥniko kaj ĉiuj sciencoj, kiuj fulmrapide disvastiĝas kaj pliriĉigas nian kulturon : medicino, fiziko, ĥemio, elektroniko, metafiziko, kosmonaŭtiko, ktp. Ĉar sciencoj forĝis al si terminojn, kiujn ili ĉerpis el la latina kaj la greka lingvoj, Esperanto ilin adoptis laŭ la paragrafo 15 de la gramatika Fundamento sub la formo de neologismoj. Tiu pliriĉigo de nia vortaro estas natura kaj ne estigas problemojn.

Sed ĉu necesas krei neologismojn, kiam la konceptoj aŭ objektoj, kiujn ili celas estas jam esprimitaj de jam de longe komunizitaj vortoj ? En tiu parto de la problemo regas plena subjektiveco. Mi ĵus legis en la marta numero de "El Popola Ĉinio" ĉapitron titolitan : "Eminentaj kadrinoj". Ĉu la uzo de tiu neologismo ne respondas al vera bezono, se ne paroli pri ĝia elvokiveco vidante sube grupon da ridetantaj junulinoj. Alie statas pri la poezia lingvo. Poetoj ŝatas havi je sia dispono multajn koncizajn radikojn, kiuj provizu ilin per abundo da riĉaj rimoj. Ili do forbalais la longajn maloportunajn kunmetaĵojn kaj precipe la mal-vortojn, kiujn ili anstataŭigis per pli koncizaj radikoj pruntitaj el la latina aŭ el la modernaj lingvoj. Al tiu kategorio apartenas i.a. pigra, plumpa,

leĝera, trista, povra, stulta... La uzado de tiuj neologismoj en la poezio tute ne povas ĝeni la komunan uzanton, sed la danĝero kuŝas en tio ke ili iom post iom invadas la ĉiutagan vortaron kaj forpuŝas la komunuzajn fundamentajn vortojn. "Stulta" jam de longe tute malaperigis la iaman "malsprita". "Povra" sekvas la saman vojon kun strikta senco, kiun ĝi alprenis el la franca. Ĝi signifas "kompatinda" kun nuanco de malŝatindeco.

Tiu plistriktigo de la senco de iuj komunuzaj vortoj kondukis kelkajn verkistojn uzi neologismojn por nepriigi tiujn sencojn. Al tiu kategorio apartenas : kultivi (anst. kulturi), kirko (anstataŭ preĝejo katolika), forsto (anstataŭ arbaro). Ne ĉiuj atingis saman sukceson. "Forsto" havas la avantaĝon ebligi pluan faradon de kunmetaĵoj : "forstumi, forstisto, reforstumi...". Sed "kirko" ne sukcesis forpuŝi nian malnovan "preĝejo", kvankam oni preĝas ankaŭ en la sinagogoj, en la temploj, en la moskeoj.

Al la supraj adjektivoj kaj substantivoj oni povas aldoni la prepozicion DE, de kies unu el ĝiaj multaj sencoj oni sentis la bezonon senigi ĝin, kiam ĝi enkondukas la agent-espriman komplementon de pasiva verbo. Oni iam proponis DI sed tiu formo ne trovis prosperon kaj estis baldaŭ forgesita. Nun oni pli kaj pli uzas FAR kiu estas pli logika. Ĉu ankaŭ en tiu preciza rolo praviĝas la uzo de tiu neologismo ? Povas esti ke, en iuj okazoj la senco de agent-esprima komplemento kolizias kun tiu de origin-esprima adjekto. Oni citas la ekzemplon : "Tiu ĉevalo estis aĉetita de Petro" kio povas signifi ke Petro aĉetis la ĉevalon aŭ ke Petro estis la antaŭa posedanto de la ĉevalo de kiu oni aĉetis ĝin. Uzante la prepozicion FAR oni nepriigas la unuan sencan kaj forigas la dusencecon; pli malfacile estas nepriigi la duan sencan. Oni povas proponi la apenaŭ konsilindan formon : "Tiu ĉevalo estis aĉetita ELDE Petro". En la koncernaj prezentitaj ekzemploj la uzo de DE tute ne prezentas malklaron aŭ dubesencecon kaj ne trudiĝas la uzo de neologismo.

Resume la uzo de neologismoj estas afero de mezuro kaj oportuneco. Rilatante kun alinacia esperantisto, kies lingvan klerecon oni ne konas, oni sin detenu de la uzo de neologismoj; ne ĉiuj esperantistoj disponas pri la P.I.V. por tuj uzebleco. Oni singarde uzu nur komunuzajn vortojn lasante la neologismojn por la rilatoj kun pli spertaj gramatikuloj.

(S.A., jul.72)

A L I O , A L I E L , A L I A M , ktp...

D.: En la decembra numero de SENNACIULO mi legis la artikolon "Senbalastigu la vortojn". Kion opinii pri la uzado de la vortoj ALIO, ALIEL, ALIAM, ktp ?

R.: Pretekste de senbalastigo kaj de oportuneco iuj esperantistoj favoras tiujn formojn. En sia letero "For la idismon" Lanti pledas favore al ilia uzado, reliefante la oportunecon, kiun ili alportas en la komunan parolon.

Bedaŭrinde li ne malkovris la dorsflankon de la medalo, t.e. la konfuzon kiun tiu sistemo enkondukas en la lingvon. Cetere la profito estas tre malgranda ; ALIEL ne estas pli simpla ol la oficiala ALIE; ALIAM ne prezentas grandan avantaĝon super ALIFOJE. ALIE (ALILOKE) kolizias kun la oficiala ALIE (ALIMANIERE) kaj alportas konfuzon en tion, kiel kompreni tiun vorton. Kiam oni renkontas tiun vorton oni devas scii ĉu la aŭtoro estas ĝisosta fundamentisto aŭ ĉu li estas favoranto de la ali-tabela sistemo, kio estas rompo en la unueco de la lingvo. Plej bone ilustras tiun konfuzon la ekzemploj, kiujn oni trovas sur la kontraŭa paĝo de la koncerna artikolo; en la artikolo "Kontraŭ kancero" mi legas : "Rilate tiun malsanon plej timinde estas formigro de la patologa ĉelburgono el la origina loko ALIEN" (aliloken). La kunteksto neprigas la sencan interkrampe montritan. En la dua kolumno de la sama artikolo mi renkontas la vorton "alidirite" en kiu la adjektiva radiko ALI estas adverbigita ne kun la senco de ALILOKE, sed kun la ĝenerala senco ALIMANIERE. Por resti konsekvenca la aŭtoro devus diri ALIMANIERE DIRITE aŭ laŭ sia sistemo ALIEL DIRITE. Tuŝi la mekanismon de nia lingvo estas same delikate kiel modifi la radaron de bonega horloĝo. Ni estu singardemaj !

(S.A., jan.65)

SEMPERA VERBIGO de ADJEKTIVOJ

D.: En mia ĵurnalo mi legis la strangan titolon : "Pékin chinoise avec Moscou à propos de l'aide au Vietnam". Kvankam tiu ĉi frazo neniel rilatas al Esperanto, mi ne rezistas la deziron ĝin komuniki al vi.

R.: Tute male, tiu frazo estas tre interesa laŭ la lingva vidpunkto, ĉar ĝi elvokas problemon ofte pridiskutatan en niaj gramatikistaj rondoj, nome la rektan verbigon de adjektiva

radiko. Plie ĝi montras al la kontraŭuloj de Esperanto, ke la laŭdira artefariteco de nia lingvo etendas siajn palp-brakojn ĝis en niaj naciaj lingvoj.

Unuavide oni povus supozi, ke tiun frazon skribis esperantisto subgvidate de la infekta spirito de nia lingvo. Jam en la fruaj jaroj de sia ekzisto Esperanto konis tiun fenomenon kaj hodiaŭ tiaj frazoj kiel "vi pravas, necesas ke... kiel vi sanas? tute oportunas ke, ktp" ŝajnas al ni tute naturaj kaj klaraj. Sed oni estu singardemaj pri la plua disvolviĝo de tiu interesa rimedo; ĉar ne ĉiuj adjektivoj same facile submetiĝas al tiu procedo. Oni precipe konsideru, ke tiuj verboj estas veraj kunmetaĵoj, en kiuj la rilato inter ilia verbeco kaj la ideo esprimita de la adjektiva flankelemento devas esti klara. La senco de la kunmetaĵo restu travidebla kaj ne fariĝu vera enigmo, kia certe estas tiu de la franclingva menciita frazo, ĉar se okcident-eŭropano kapablas eltiri el la nunaj cirkonstancoj proksimuman sencon, mi dubas ĉu ĉino same facile komprenus ĝin, en ĝia laŭvorta traduko.

Mi legas : "Al ĉi tiuj stilmanieroj aldoniĝas la preskaŭ senlima fantazio, kiu bunte flugilas sur ĉiu lia bildo". Tiu verbigo de substantivo, kiu mem derivas de verbo eble estas tre interesa por la poetoj en serĉo de originaj nuncigitaj formoj, sed en vulgara prozo ĝi aperas pedante plumpa.

Plie la ricevita vorto restu harmonia kaj ne vundu la orelojn. Mi legas i.a. "...kaj kiuj malagrablas al la oreloj". Ĉu la aŭtoro ne mem malagrablas al la oreloj uzante tiun verbon anstataŭ la simpla "estas malagrabla" ?

(S.A., jul.66)

Pri la K O N D E N S A D O de la malsimplaj verboformoj

D.: K-do Valo skribas :

En Sennacieca Revuo 1973 aperis tre interesa artikolo de Breŭninger "Pri Mona Ekonomio", en kiu la aŭtoro sisteme uzadis la simplan verban formon anstataŭ "esti" kun predikativo, ekz.: "Distingendas bezonoj necesaj kaj malnecesaj por la vivo. Kun ĉiu objekto korelativas certa kvanto da mono. Ŝuldoj kalkulendas kiel negativa posedata mono". Same li anstataŭigadis per simpla formo la kutiman pasivan formon "estas ...ata". Ekz.: "La valoro de objekto, servo aŭ ago determinatas per ties kapablo kontentigi bezonon".

"Ofte tio ne sufiĉe atentatas". "Ĉe tiu difino la proprieto esprimatas per mono". Tamen li ankoraŭ skribis : "La vendvaloro devas esti ne konfuzata kun la socia valoro... (kial ne konfuzati ?)" "per la mono povas esti akirata nun malpli da objektoj kaj tial ankaŭ malpli da bezonoj povas esti kontentigataj" "Se proprieto estas mezurata per ĝia kapablo kontentigi bezonojn..". Nu, tiuj lastaj formoj estas kutimaj, dum la formoj " ...atas" aspektas nove. Ĉu aprobindaj ?

Unuavide, kial ne ? Ili ja ŝajnas perfekte klaraj kaj neniel kontraŭaj al la gramatika spirito de Esperanto. Tamen io ĝenas min, pro la ĝenerala simitrieco inter la participoj pasivaj kaj aktivaj. Dum "atas" ŝajnas al mi tute akceptebla, mi ne bone vidus la anstataŭigon de "estas ...anta" per simpla " ...antas" do anstataŭ "mi estas skribanta" mi dirus "mi skribantas"; ĉu tio ne aspektus strange, kiel pleonasma kaj pedanta formo, identasenca je "mi skribas" ? Sed ĉu tio estus sufiĉa motivo por malakcepti "atas" ?

Kion opinias kompetentaj gramatikistoj ?

R.: En sia demando K-do Valo levas tre interesan problemon, kiun pritrakti necesigus pli longan malvolvon ol kian ebligas nia modesta rubriko. Por tiuj, kiujn interesas tiu lingva demando mi konsilas la legadon de la libreto "La senpera verbigo de adjektivoj" en kiu la aŭtoro H.A. De Hoog ĝisfunde studas tiun fenomenon. Tamen, ĉar la demando de Valo pli strikte rilatas al la kondensado de la malsimplaj verboformoj, estas oportune formuli tujan prijuĝon. En la citita libro oni povas legi (p.21):

"La formoj "amatas, amintas" ne prezentas tiajn avantaĝojn, ke oni povus rekomendi ilin. Ido havas tiajn formojn : amesas = estas amata; amabis = estis aminta; amesabis = estis amita.

"Pri tiuj formoj D-ro Manders prave skribis : "En artefarita lingvo, kiu strebas al la plej granda lernebleco por kiom plej granda nombro da homoj, ne estas pravigeble, enkonduki, flanke de la malfacilaj particip-konstruoj, la ankoraŭ pli malfacilajn mallongajn formojn nur pro estetikaj konsideroj" (Vijf Kunsttallen p.301, trad.D.H.). Plue Manders rimarkigas, ke ili ne signifas simpligon de la lingvo, ĉar oni povas ilin kompreni nur, se oni konas ankaŭ la paralelajn formojn kun la participoj". Kurioze la formoj aktivaj "...antas" ŝajnas al Valo pli strangaj ol la pasivaj "...itas", kvankam en la praktiko ili estas same malfacile digesteblaj, kaj kiam en iu legaĵo oni renkontas tro multajn tiajn elcerbumaĵojn, oni forgesas priatenti

la esencon de la legaĵo kaj oni pro seninteresiĝo fermas la libron. Oni ne argumentu, ke tia estas la evoluo de la lingvo. Evoluo devas esti sana, precipe kiam temas pri lingvo, kiu ankoraŭ ne estas senrezerve akceptita kaj bezonas patrinecan vartadon.

(S.A., feb. 74)

* *
*

 * K O N K L U D E : *

K I E L P E R F E K T I G I S I N ...

La perkorespondaj kaj eĉ la publikaj kursoj ne sufiĉas por edukado de bonegaj esperantistoj; nepre necesas kompletiga persona laboro.

1. Praktiko skriba. Pro la izoleco de multaj kamaradoj loĝantaj en malgrandaj vilaĝoj, tiu praktikado de la lingvo estas tre grava, ĝi efektiviĝu per la internacia korespondado kaj per la studo de nia literaturo.

- a) Internacia korespondado. Ĝi ebligas la tujan uzadon de la akiritaj konoj, alkiutimigante la studenton al la internacia stilo, forigante la nacilingvajn formojn. Ĝi vigligas la intereson en la praktikado de la lingvo, se oni trovis seriozajn korespondantojn.
- b) Studo de nia literaturo. La unuaj esperantistoj disponis nur pri lernolibroj kaj malmultaj verkoj. Hodiaŭ nia literaturo ampleksas multajn verkojn, inter kiuj oni elektu la plej taŭgajn. Post la unuaj klasikaj verkistoj, Zamenhof, Grabowski, Kabe, aperis nombro da aliaj, i.a. J. Baghy, K. Kalocsay, Engholm, Szilagyi, kiuj poluris la lingvon kaj ĝin pliriĉigis.
- Oni legu unue la verkojn de niaj klasikuloj, precipe tiujn de Zamenhof, kiuj estas la fundamento sur kiu poste evoluigis la lingvo. El la nuna literatura produkto, ni elektu tiujn verkojn, pri kies stilo ĉiuj konsentas, ke ĝi estas bonega kaj imitinda.
- Nepre necesas la uzo de la P.V. por kontroli la renkontitajn formojn kaj vortojn, pri kies senco estiĝas dubo. Tiuj formoj kaj vortoj estos zorge notitaj sur papartaj slipoj kun la indiko de la fonto.
- Ĉiu serioza esperantisto havu sian propran bibliotekon. Aĉeti kiel eble plej multajn esp. librojn estas devo por la progresinto. Dume, li uzu la servojn de la cirkulantaj bibliotekoj. Li abonu seriozajn gazetojn kaj revuojn. Bedaŭrinde en multaj nun aperantaj revuoj svarmas la preseraroj kaj malkorektaj formoj. Estas devo por la redaktantoj de esp. revuoj presigi nur senriproĉajn tekstojn.
- La rolo de la profesoro estas konsili la studenton pri la

legendaj verkoj, gradigi la legaĵojn laŭ la kapablo de la lernanto kaj klarigi la renkontitajn malfacilaĵojn rilate al la stilo aŭ la gramatiko.

2: Praktiko parola. Oni uzu ĉiujn okazojn praktiki buŝe la lingvon en la esp. renkontiĝoj kaj kongresoj. Estas devo por la aranĝantoj de esp. kongresoj postuli kiel eble plej la uzon de Esperanto en la debatoj kaj en la diversaj manifestacioj.

KONKLUDO. Ni estu konsekvencaj propagandistoj. Se ni deziras, ke oni serioze konsideru nian movadon, ni estu mem seriozaj batalantoj. Ni praktiku ĉiel kaj ĉie nian lingvon kaj montru al la mondo, ke Esperanto estas vivanta lingvo kaj ne simpla bagatela projekto.

(E.L., maj.48)

.---=O=---

En la sama serio :

Lentaigne : "Kiel diri...?"

(praktika esperanta frazeologio;
5000 esprimoj,¹³⁶~~172~~ p. , 25FF)

"...Ni deziras krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tute pretajn vortkonstruojn, kaj tiel helpi ilin atingi fluan parolkapablon laŭ vere zamenhafa stilo. Por tio ni provizas ilin per materialo relative abunda, en kiu ili trovos verŝajne la eblon solvi multajn problemojn. La esprimoj estas kliŝitaj dirmanieroj, sankciitaj de la uzado...."
